

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 618 (5)


Majo 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

*La Turo Eiffel
atendas vin en Parizo*



**PARTOPRENU EN LA PARIZA
ANTAŬKONGRESO!**



ESPERANTO

Majo 1957

Revuo Internacia

N-ro 618 (5)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornsidge Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi
respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon
(vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu du da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chia-
brera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario,
77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri
financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O,
Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fille-
brook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj
aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj
asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-
Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Decidoj de la Estraro	73
Nia popolo	73
Esp. aprobita de Amerika Kongreso	74
Via kongresa vojaĝo	76
La graveco de niaj kongresoj	78
Pri la unua Universala Kongreso	81
Momentfoto. J. Francis	82
La malamiko. B. Trudiĉ	83

Rubrikoj

La internaciaj konkursoj	79
Monda galerio	80
La Juna Vivo	85
Tra la mondo	86
Novaj libroj	88
42a U.K.	89
Niaj konkursoj	89
Radio	89
Nia forumo	90
Oficiala informilo	91

DECIDOJ DE LA PASKA KUNSIDO DE LA ESTRARO

La 19an kaj 20an de aprilo kunvenis la Estraro en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam. Ĉeestis ĉiuj Estraranoj kaj la Redaktoro. La kunsidojn prezidis Prof. D-ro G. Canuto.

La Estraro antaŭ ĉio konstatis, ke per skriba voĉdonado estis faritaj 32 decidoj ekde la Kongreso en Kopenhago. La Estraranoj interŝanĝis skribajn raportojn pri la diversaj fakoj, por kiuj ili respondecas. Montriĝis, ke sur ĉiuj kampoj estas farita konsiderinda progreso en la pasinta laborjaro.

La Estraro kun plezuro konstatis ke malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj, la L.K.K. kaj la K.K.S. bonege laboris. La aprobita programo promesas tre altnivelan kaj ĉiurilate interesan kongresan semajnon en Marseille. Ĝis la fino de aprilo aliĝis iom pli ol 1,000 personoj, sed la Estraro estas konvinkita, ke ĝis la fino de junio ankoraŭ multaj aliĝos kaj tiel kontribuos al pli granda sukceso de la 42a U.K. Ĝi tute speciale apelacias al la fidela esperantistaro de Francujo kaj la apudaj landoj aliĝi al la Kongreso.

Kiel kongresurbo por la jaro 1958 estas unuanime elektita Mainz.

La Estraro konstatis, ke la nuna enhavo kaj ekstera aspekto de la gazeto trovis ĝeneralan aprobon ĉe la membraro. Kvankam la revuo en la jaro 1956 havis 64 paĝojn pli ol en la jaro 1955 (kalkulite laŭ la formato de 1955), tamen montriĝas, ke pro la abundo de la materialoj, kaŭzita de la ĉiam pli ampleksaj agadoj kaj de la granda kresko de la membraro, tio tute ne sufiĉas. La Komitato en Marseille diskutos la proponon de la Estraro por solvi tiun problemon. Ankaŭ la Jarlibro havas 32 paĝojn pli ol en 1956. Entute ĉiu membro-abonanto ricevis la revuon de 480 paĝoj (formato 1955) kaj la jarlibron (ambaŭ partoj) de 416 paĝoj. Tio estas preskaŭ 900 paĝoj kaj la kotizo de 10.— gld. apenaŭ sufiĉas por kovri la efektivajn elspezojn. Tial la Estraro apelacias al ĉiu membro libervole altigi sian kotizon al Membro-Subtenanto.

Post „Vagado sub Palmoj” de Jean Ribillard, la Eldona Fakto de UEA aperigos kiel sekvantan eldonaĵon la verkon „Angla Antologio”, kies manuskripto estas jam preta.

El al aliaj decidoj menciindaj estas tiuj pri la oficialigo de Koresponda Servo Mondskala kaj pri la fondo de Esperanta Sonarkivo. Estas decidite, ke la Prezidanto vizitos la Servan Centron en Ĝenevo por preparoli kun s-ro Jakob la eblecojn translokigi la bibliotekon de UEA al Rotterdam. Plue estas decidite eldonadi la Ŝlosilon en la lingvoj de aziaj popoloj. La preparlaboroj por fondo de la Lingva Komisiono de UEA kontentige progresis kaj espereble en Marseille estos proponita al la Komitato la regularo de tiu komisiono.

Estas faritaj konformaj decidoj koncerne la intensigon de la kunlaborado kun UNESKO, kun UN kaj aliaj organizaĵoj, kiel ankaŭ koncerne la pluan agadon de la Asocio rilate la Eŭropan Lingvan Kampanjon. Kun danko estis akceptita la raporto de la estinta prezidanto de UEA, s-ro E. Malmgren, pri la lerneja kampanjo.

Unu el la ĉefaj punktoj de la tagordo rilatis al la situacio en la Centra Oficejo kaj al la financoj de la Asocio. La Estraro konstatis, ke la parta reorganizo de la laboro en la Oficejo donis bonajn rezultojn, sed ke la Direktorino kaj ŝiaj tri helpantoj, malgraŭ la granda streĉo de la fortoj, apenaŭ sukcesas plenumi la senĉese ampleksiĝantajn taskojn. Estos nepre necese trovi financajn rimedojn por ebligi la dungon de plia oficisto. En la nuna momento UEA havas la saman nombron da geoficistoj kiel antaŭ kelkaj jaroj, kvankam la nombro de la membraro preskaŭ duobligis (la definitiva cifero por 1956 estas 25.181) kaj la agado treege ampleksiĝis. Ankaŭ tiurilate la Estraro faros konkretan proponon al la Komitato.

En la kunsidoj regis spirito de plej harmonia kunlaboro, kiu ebligis ke la abunda tagordo povis esti pritraktita en nuraj du tagoj. I. L.

Nia Popolo

Hodiaŭ, ne por la unua fojo, neesperantistaj entreprenoj eldonas revuojn en Esperanto. Per tiu fakto oni rekonas la valoron de nia lingvo. Ofte tamen, tiaj eldonoj ne havas daŭran sukceson. Kial ili fiaskas?

Mi opinias, ke la ĉefa kaŭzo kaŝiĝas en ne ĝusta kompreno flanke de la eldonintoj. Ili ofte konsideras nur la tehnikan rimedon, kiun ili utiligas: la lingvon, sed ne ankaŭ la popolon, kiu uzas ĝin. Kaj la popolo sendube estas la ĉefa kaj pli grava faktoro. Nia esperantista popolo, kvankam ne multnombra, havas siajn specifajn kvalitojn; kiel ekzemplon mi mencias nur kelkajn el ili.

Jen: inter la esperantistoj ne estas eĉ unu analfabeto; ĉiu el ili konas almenaŭ du lingvojn kaj multaj el ili posedas po kelkaj lingvoj; la esperantistoj loĝas ĉie sur la vasta terglobo kaj iliaj reprezentantoj estas perfekte organizitaj en speciala delegita reto, kiu estas en plena dispono al ĉiu organizita membro. Neniu lando en la mondo havas pli perfektan aranĝon de siaj internaciaj kontaktoj en amasa praktiko. Nia organizo estas apenaŭ kredebla afero, sed fakto. Neniu ŝtato povas konkuri kun ni en tiu rilato; ĉiuj esperantistoj estas homoj progresemaj, inteligentaj, kun larĝaj konceptoj kaj vere demokrataj; ili nepre estimas la konvinkojn de alimaniere pensantaj homoj, ŝatas la liberon, la pacon, la justecon kaj la toleremon; kaj fine ĉiuj el ili estas aktivaj kulturagantoj en sia lando kaj internacie; ili aĉetas diversdevenajn librojn kaj revuojn, korespondas kun aliaj landoj, vizitas internaciajn renkontiĝojn kaj kongresojn, akceptas alilandajn gastojn kaj mem gastas alilande, ktp.

Do, se la neesperantistaj eldonantoj konsideras traŝe, kio povas interesi tiun multkoloran sed ne sen propraj trajtoj kaj deziroj popolon, kaj se ili prezentas konvencan nutraĵon al ĝi, ili certe ne fiaskos. M. P.

Esperanto aprobita de 6a Amerika Kongreso de Edukistoj

Sukcesa agado de Prof. Manuel Fernández Menéndez

La 6a Amerika Kongreso de Edukistoj (21—28 januaro, 1957) estis kongreso de institucioj, t.e. asocioj kaj sindikatoj de geinstruistoj kaj profesoroj apartenantaj al la amerikaj landoj (Norda, Centra kaj Suda Ameriko). Ĉiu asocio povis sendi al la Kongreso unu aŭ plurajn reprezentantojn, kiuj estis Delegitoj. Ĉar Urugvaja Esperanto-Societo aliĝis al la Kongreso, mi estis agnoskita kiel Frateca Delegito. Sekve oni rajtigis min deponi en la Sekretariejon la presitan materialon pri Esperanto disdonotan al ĉiuj Delegitoj kune kun la dokumentaro de la Kongreso; ĉi tiu materialo konsistis el: la faldfolio seslingva de UEA, la okpaĝa Esperanto-informilo, kiun oni disdonis en la 1-a Universala Esp. Ekspozicio, kaj flugfolio eldonita de UEA pri la triumfo de Esp. ĉe UNESKO.

La 21-an de januaro okazis la solena inaŭguro. En la dua kongresa tago okazis la disdonado de kartoneta teko enhavanta la kongresdokumentojn kaj ankaŭ la informilojn pri la Internacia Lingvo Esperanto. En la tria tago mi enskribigis min en la 4-an Laborkomisionon (pri Diversaj Aferoj).

En la Laborkomisiono

La Laborkomisiono pri Diversaj Aferoj konsistis el 23 Delegitoj, kiuj reprezentis 7 landojn. Mi observis la ĉeestantajn Delegitojn, sume dek ses. Dum oni atendis la malfermon de la kunsido mi diskrete demandis, ĉu ĉiu Delegito posedas la informilojn pri Esperanto; ĉiuj jesis, sed tri el ili petis plian ekzempleron, kiun mi kompleze enmanigis. Krome mi disdonis al la partoprenantoj en ĉi tiu Komisiono la Dokumenton CED/4 kaj hispanan Ĉefeĉan Ŝlosilon.

La kunsido estis malfermita. En la tagordo mia propono pri Esp. okupis la trian lokon. La diskutado de la unuaj du temoj okupis la tutan matenon. La prezidanto F-ino Celia Olivera (Urugvaja) fermis la kunsidon anoncanta, ke post la tagmanĝo oni pritraktos la proponon pri Esp.

Duonhoron antaŭ la nova sesio mi jam troviĝis en la kunsido kun granda valizo da esperantaj libroj, gazetoj, revuoj kaj turismaj broŝuroj ilustritaj; la plej gravaj verkoj kaj publikaĵoj troviĝis tie por ke la Delegitoj vidu kaj trarigardu ilin; ankaŭ fotoj de la lastaj kongresoj. La alvenintoj trarigardis kun intereso; mi respondis al demandoj kaj akcentis la gravecon de la Esp.-Literaturo traduka kaj originala, kaj uzadon de Esp. en la turisma propagando; samtempe mi vokis la atenton de la Delegitoj pri la 1-a Universala Ekspozicio de Esperanto, okazinta en Montevideo antaŭ du jaroj, pri kies graveco ili povis formi al si ideon legante la resumon de la diversaj fakoj en la

koncerna informilo, kiun ĉiu posedis. Mi rimarkis miran mienon ĉe kelkaj ĉeestantoj, kaj aldonis, ke tiuj libroj ktp estas nur tre eta specimenaro de la grandega tuto ĝis nun aperinta.

La kunsido denove malfermiĝis je la 15a 30 kun 14 ĉeestantoj. La Sekretario S-ro Angel Pizarro (ĉilano) legis jenan proponon de rezolucio prezentita de mi je nomo de Urugvaja Esperanto-Societo:

Konsiderante ke, en la nuna stato de la civilizacio, estas necesega la enkonduko de neŭtrala kaj facila lingvo por la internaciaj interrilatoj; konsiderante ke, tiel en la parolata lingvo kiel en la lingvo skribata, Esperanto elmontris per ne superebla maniero posedi la necesajn kvalitojn por servi kiel facila interkomprenigilo por ĉiuj popoloj, kion oni povas konstati per la tutmonda disvastiĝo atingita de la nomita lingvo, kies plej alta elmonro de ĝiaj rimarkindaj progresoj evidentiĝis pere de la 1-a Universala Ekspozicio de Esperanto okazinta en la urugvaja ĉefurbo antaŭ du jaroj; konsiderante ke, per la rezolucio de la 8-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO, okazinta en Montevideo en novembro kaj decembro de 1954, ĉi tiu grava institucio de la Unuiĝintaj Nacioj agnoskis la valoron de Esperanto por siaj propraj celoj, tio estas, por la universala paco, kiel por la edukado, la scienco kaj kulturo,

La 6-a Amerika Kongreso de Edukistoj deklaras, ke estas neprokrasteble necesa la enkonduko de la Internacia Lingvo Esperanto, kiel lingvo facila kaj neŭtrala por ĉiuj popoloj, kaj sekve, rekomendas al ĉiuj edukistoj la lernadon kaj disvastigon de la nomita Internacia Lingvo, kaj la Kongreso admonas ilin klopodi por ĝia enkonduko en la instruadon de iliaj respektivaj landoj kune kun la patra lingvo."

La Prezidanto, F-ino Celia Olivera, donis al mi la parolon por defendi la proponon, memorigante, ke la regularo min rajtigas paroli dum kvin minutoj, kaj dum pliaj kvin minutoj se la plimulto el la ĉeestantaro tion akceptas. Ĉar la temo Esperanto estas novaĵo por la sinjoroj Delegitoj, kaj konsiderante mem ĝian gravecon, mi demandis, ĉu ne estas eble plilongigi tiun tempon. La Prezidantino respondis, ke ne estas eble tion fari, ĉar la regularo ne permesas. Tiam mi gardas dudekpaĝan skribaĵon en tekono, kaj eksponas senpere miajn argumentojn favorajn al Esp.

La Prezidanto poste donis la parolon al la Delegitoj. Interalie, S-ro Homero Villamil (ekvadorano) demandis, „Kiu pagas la kostojn de la Esperanto-Movado?" Mi respondis ke la movado mem pagas siajn elspezojn, per la kontribuadoj de multaj miloj da adeptoj, idealistaj personoj, kiuj sentas la grandan kaj noblan idealon de la Internacia Lingvo.

S-ro Angel Pizarro (ĉilano), unu el la Sekretarioj de la 4a Komisiono, opiniis, ke la Komisiono nepovas alpreni rezolucion pri Esperanto, tial ke la Delegitoj venis al la Kongreso kun difinitaj

celoj fiksitaj de la edukistaj asocioj. Kelkaj Delegitoj intervenis; unuj favore, aliaj kontraŭ.

Tiam la Prezidentino sciigis, ke se neniue Efektiva Delegito subskribas mian proponon, ĝi ne povos esti voĉdonata de la Komisiono. Responde, la urugvaja Delegito F-ino Alegría Cazarré proponis akcepti mian eksponon de la motivoj kaj anstataŭi mian proponon per la jena rezolucio:

La 6-a Kongreso Amerika de Edukistoj rekomendas, ke la organizaĵoj de edukado studu la prezentitan problemon pri la disvastigo de Esperanto kiel universala lingvo, kaj ili informu al Universala Esperanto-Asocio."

Denove mi petis la parolon por diri mian opinion pri tiu nova propono, kaj dankinte la Delegiton pro ŝia intereso kaj bonvolo por Esperanto, mi atentigis la Komisionon, ke la anstataŭa rezolucio tute ŝanĝis la sencon de la propono de UES, kaj unuavide ĝi ŝajnas al mi iom konfuziga. F-ino Cazarré defendis sian proponon, dirante interalie, ke ĝi devigos la instituciojn de edukistoj studi Esperanton. La brazila Delegito proponis, ke oni fermu la diskutadon pri ĉi tiu temo; la Komisiono tion decidis; oni voĉdonis la du rezoluciojn laŭorde kaj rezultis aprobita tiu de F-ino Cazarré.

Mi atente studis la rezolucion. Mi antaŭvidis, kiam la asocioj de edukistoj ricevos tiun rekomendon, certe la respektivaj komitatoj enmetos ĝin en paperujon, kaj tie ĝi restos por eterne dormanta.

Novaj Klopodoj

Poste mi alparolis F-inon Olivera, Prezidento de la 4a Komisiono, kaj ni konversaciis amike pri la afero. Mi enpensis al ŝi miajn priokupojn rilate la rezolucion aprobitan, demandante al ŝi, ĉu ne estus eble rekonsideri tiun decidon. Ŝia respondo estis nea; sed ŝi aldonis, ke se mi prezentos novan proponon al la Kongresa Sekretario, oni povos ĝin pritrakti, ĉar la 4a Komisiono devos kunveniplian fojon por konsideri aliajn du novaĵojn. Akceptante tiun sugeston, mi simpligis la unuan proponon kaj prezentis novan redaktitan jene:

La 6-a Amerika Kongreso de Edukistoj rekomendas al ĉiuj instruistoj kaj profesoroj la lernadon de la internacia lingvo Esperanto, kaj ilin admonas klopodi por ĝia enkonduko en la instruadon de iliaj respektivaj landoj kune kun la patra lingvo.

Dum la sabato daŭrigis la Asembleo, pritraktante la raportojn de la Laborkomisionoj. Dume mi konsideris konvene kontakti kun pluraj eksterlandaj Delegitoj, interparolante kun ili pri diversaj temoj, prefere pri iliaj respektivaj landoj, ĝis kiam la konversacio diskrete kaj tute nature „venis” al la Internacia Lingvo. Diversaj Delegitoj kiuj estis legintaj la informilojn esprimis sian simpatian pri Esp. kaj pensis ke la Edukista Kongreso devas apogi; aliaj sin montris dubemaj, sed neniun mi trovis kontraŭa. Hazarde mi renkontiĝis kun funkciulo de la Aviada Panamerika Kompanio (PAA), S-ro Oscar de los Santos Diago, kiu, vidante la

Esp.-informilojn, kiujn mi klarigis al la Delegito de Puerto Riko, petis en Esperanto: „Ĉu vi povas doni al mi ekzempleron?” „Ho, sinjoro! vi estas esperantisto; mi gratulas vin,” mi diris. Kaj ni interŝanĝis kelkajn frazojn antaŭ la puertorika Delegito, kiu estis tre agrable impresita.

Malakcepto kaj Triumfo

Fine, lunde kunsidis lastfoje la 4a Laborkomisiono por pritrakti kvar novajn aferojn, inter ili mian novan proponon favoran al Esp. Mi klarigis tute simple, ke la celo de UES estas atingi senkaŝan apogon de la Edukista Kongreso por Esp., same kiel ĝi jam estas donita de aliaj gravaj institucioj kaj kongresoj. Sed bedaŭrinde mi ne sukcesis ŝanĝi la rezolucion, ĉar unu el la du Sekretarioj, apogata de du aliaj Delegitoj, „tre afable” protestis ĉar mi kaŭzas tempoperdon per mia insistado pri tiu jam solvita afero. Oni petis voĉdoni kaj la rezultato estis malfavora al mia propono. La Prezidentino diris, ke mi povos prezenti mian ŝanĝon en la Asembleo, kiu eble ĝin akceptos. Mi respondis, ke mi tion faros, sed mi esperas pri tio bonvolemon de la membroj de la 4a Komisiono.


Oni sciigis min, ke, se necese, la Asembleo kunsidos dumnokte ĝis fini ĉiujn aferojn. Mi redaktis novan, tre mallongan kaj precizan rezolucion, kiu estis proponata de iu Delegito al la Asembleo:

La 6a Amerika Kongreso de Edukistoj rekomendas al ĉiuj instruistoj kaj profesoroj la lernadon de la internacia lingvo Esperanto, pro ĝia granda utilo por la internaciaj interrilatoj.


Je la 0a horo la Delegitoj denove kunsidis en Asembleo. F-ino Olivera legis sian raporton, kiu estis ĝenerale aprobita. Sekvis speciala konsidero de ĉiu aparta temo. Okazis diskutado. Kelkaj Delegitoj pretendis trouzi la parolon, sed la Prezidentino strikte aplikis la regularon kaj la diskutado rapidiris. Sed pasis du horoj, tri... kaj malmalpacienco malkvietigis min, ĝis kiam, fine, la Prezidentino anoncis la peton pri Esperanto (kelkaj aplaŭdoj aŭdiĝis) kaj sciigis, ke propono estas prezentita al la Asembleo; li mem legis la mallongan rezolucion pri Esperanto laste skribitan de mi kaj disdonitan al diverslandaj Delegitoj favoraj al nia afero. „Se neniue parolos, oni konsideros ĝin aprobita”, diris la Prezidentino. (Mi estis pripensinta kvinminutan paroladon por ĉi okazo, sed mi silentis por vidi, kio fariĝas.) Momento de nervoza atendo. Mia koro forte batis... Aprobita! ekkriis la Prezidentino (multaj aplaŭdoj en la Asembleo). Kelkaj konataj Delegitoj rigardis min el siaj sidlokoj, farante afablajn gestojn de gratulo. Mia emocio estis granda, sed mi restis sidanta ĝis la fino de la sesio, kio okazis rapide post la aprobo de la ceteraj aferoj. Estis la 3a30 frumatene de la 29a de januaro.

Manuel Fernández Menéndez


VIA KONGRESA VOJAĜO




Via kongresa vojaĝo ĝuos parentezon de dolĉeco en tiaj romantikaj aspektoj de Parizo...




...aŭ ĝi estos skuata de la grandioza beleco de Versailles...



...sed la harmoniaj linioj de Notre-Dame elvokos en la lunlumo la ombrojn de Esmeralda kaj Quasimodo.




Alia antaŭkongresa alternativo estas la 13a Junularkunveno de TEJO en Ville-neuve-lez-Avignon. La bonvenigo de la Papoj en Avignon estos fiereca...




...tamen ne mankos al vi idiliaj anguloj, kiel tiu ĉi monaĥeja enirejo...



...aŭ historiaj vidaĵoj, kiel la turo de Filipo la Bela.



Ĉiuj karakterizoj kaj koloroj de la Sudo koncentriĝas en Marseille. La tuta urbo estas ĉirkaŭanta poezio al la 42a Universala Kongreso de Esperanto.



*Antaŭ viaj okuloj la artaj kaj naturaj belecoj de Marseille konkurencos.
(Foto: Mireille, eld. Gandini)*

AL *Darizo* . . .

AL *Marseille* . . .


AL *Korsika* . . .



Marseille moderna.



Ĝis revido Marseille! Ni veturas al la postkongresa ekskurso, al Korsiko.



*Ne, vi ne alvenis en Texas, sed nur en la regiono de Marseille, kie sovaĝaj ĉevaloj kaj virbovoj libere vivas. Tien la Kongreso ekskursos.
(Foto: Mireille, eld. Gandini)*



La belecoj de Korsiko estas kontrastaj. Bonifacio impresas restos en via memoro...



*Ombro kaj freŝo sub palmoj en Korsiko. Melankolio post tiom da intensaj ĝojoj...
Planoj por la venonta kongreso.*

LA GRAVECO DE NIAJ KONGRESOJ

Estas nekredeble, kiel daŭre vivadas la plej strangaj miskomprenoj pri nia lingvo kaj nia movado, malgraŭ la oftaj refutoj kaj la milfoje nerespondeble liveritaj pruvoj pri ilia maltrafo! Eĉ homoj tute honestaj papage ripetadas, senpense kaj malrespondece, maltrafajn opiniojn, restaĵon el la teoria „rezonado” de lingvistoj kaj aliaj „spertuloj” de la 19a jarcento! Sur alia paĝo en tiu ĉi numero de „Esperanto” oni trovos kelkajn ekzemplojn pri tio, sub rubriko „La Lingva Ĥaoso”.

Ĝuste en mia hodiaŭa gazeto mi legis, en nekrologo pri C. K. Ogden (inventinto de Basic English), jenan opinion: „Basic English multe progresis dum la tridekaj jaroj, kaj ankoraŭ hodiaŭ ĝi estas, laŭ mia opinio, pli fruktodona ideo ol iu ajn el la inventitaj universalaj lingvoj”. Al tio la esperantistoj povas prave starigi demandojn, kiel: Kie estas la literaturo en Basic English? Kie okazis kongresoj, kiuj utiligis tiun projekton?

Sed ne tie finiĝas la afero. Mi legis ie, antaŭ ne tre longe, ke „ĉe la esperantistaj kongresoj pruviĝis, ke eĉ la adeptoj ne sukcesas interkompreniĝi pere de sia „lingvo”!!! Tian nekredeblan misprezenton de la faktoj povas klarigi nur tio, ke la verkinto neniam ĉeestis esperantistan kongreson, aŭ ke li havas motivojn intence falsigi la aferon.

Ĉar senpartia observanto, kiu ĉeestas niajn aranĝojn, devas honeste konfesi, ke nia lingvo nepre vivas kaj perfekte plenumas sian rolon. Ĉe nia 41a en Kopenhago, la reprezentanto de la dana instrumministro, Mag. Jens Rosenkjaer, diris: „*Kia eminenta interligilo Esperanto estas inter la multaj reprezentantoj, kiuj venis el ĉiuj regionoj de la mondo — kaj pli forte: Ke la oratoroj kiujn mi aŭdis, kapablas en Esperanto tiel vive kaj tiel varme esprimi siajn sentojn kaj pensojn, ke ili sukcesis fari ponton inter koro kaj koro*”.

Ni devas neniam forgesi, ke ne sufiĉas unufoje montri sian pravecon al la mondo; necesas, en la pionira stadio de ĉiu ideo, ĉiam denove repruvi kaj demonstri la trafecon de tiu ideo, ĝis fine kreiĝas inunde favora publika opinio pri ĝi. Ne sufiĉas, ke la esperantistoj 41-foje aranĝu Kongreson, por ke ĉiuj dubemuloj kaj cinikuloj estu konvinkitaj pri la sukceso de Esperanto; eĉ pli grava estas la 42a, ĉar ĝi konfirmas la atingiĝojn kaj atestas la daŭran vivantecon de la lingvo. Unu jaro sen Kongreso, aŭ kun pro iuj kaŭzoj malsukcesa Kongreso, repuŝus tra kvin jaroj nian aferon! Ĉiuj kontraŭuloj silentigitaj de niaj sukcesoj, povus tuj elpaŝi kun freŝaj „pruvoj” pri la fiasko de Esperanto, kiuj ŝancelus la efikon de niaj lastatempaj sukcesoj, pri kies „pruvoj” la kontraŭuloj kompreneble silentadus.

La Kongresoj, niaj ĉiujaraj manifestacioj, estas fakte tre zorge observataj de ĉiuj flankoj. Nuntempe, pro la okazaĵoj ĉe UNESKO, ni venas sub lupeon de homoj en ŝlosilaj pozicioj, kaj niaj klopodoj kaj laboroj devas intensiĝi, por ke ni povu silentigi tiujn kritikojn, plejparte tute senbazajn, kiuj rekte malhelpas la vastan akceptadon de nia lingvo. Antaŭjuĝoj estas tre malfacile elradikeblaj, ni ne forgesu tion.

Kaj tial nia 42a en Marseille, kun siaj amaskunvenoj, fakkunvenoj, belartaj konkursoj, Somera Universitato — kaj ne malpli kun sia senpera renkontiĝado kaj senĝena interkompreniĝo inter ĉiaj homoj el ĉiaj lingvaj teritorioj — estu brila sukceso, kaj metu ankoraŭ unu gravan brikegon al tiu nefaligebla konstruaĵo, kiun ni lutas. Ĉiu esperantisto, kiu nur povas, devas partopreni tiun laboron per ĉeesto en Marseille.

William Auld

SENSACIA MANIFESTACIO EN PARIS 31 JULIO-2 AUGUSTO 1957

Tiuj, kiuj partoprenis en 1937 la Internacian Konferencon „Esperanto en moderna vivo” certe memoras pri la organizo kaj la programo de tiu konferenco.

Tiun ĉi jaron, en Paris, okazos sensacia manifestacio okaze de la antaŭ-kongreso al la Universala Kongreso en Marseille.

En la kadro de la antaŭkongreso, okazos la unua internacia konferenco de la popoluniversitatoj.

La antaŭkongreso kaj la konferenco havos kiel lokon, la Domon de Unesko mem, kaj la partoprenontoj de ambaŭ aranĝoj povos ĝui la diversajn allogaĵojn, kaj eĉ tag- kaj vespermanĝi en la restoracio de la Domo de Unesko.

Mardon, la 30-an de julio, la deĵorantoj de la esperantista fervoja asocio en Francujo akceptos la aliĝontojn en la diversaj stacidomoj de Paris.

Merkredon la 31-an de Julio, la programo estas jena:

9 h. Solena malfermo de la konferenco kaj de la antaŭkongreso.

10 h. Parolado pri tio, kion alportas al la Internacia interkompreniĝo, unuflanke Unesko, aliflanke la Popoluniversitatoj.

11 h. Laboro de la tri komisionoj:

a) 1a Komisiono — Ĝenerala organizado. Difino de tio, kio devas esti Popoluniversitatoj;

Disvastiĝado kaj eblecoj de la Asocio de eŭropaj popoluniversitatoj;

b) 2a Komisiono — Interrilatoj inter la Popoluniversitatoj kaj la nereĝistaraj asocioj, Unesko kaj Eŭropa Konsilantaro;

c) 3a Komisiono — Interrilatoj inter la Popoluniversitatoj por plibonigado de la plenaĝula edukado: 1e) Lingva obstaklo — Ekuzo de help-lingvo; 2e) Korespondo inter membroj; 3e) Vojaĝoj tra aliaj landoj kaj akcepto de la delegito de P.U. al P.U. kaj akcepto de membroj de P.U. al aliaj membroj.

14 h. 30 — Daŭrigo de la laboro de la komisionoj;

Vizito tra Paris por tiuj, kiuj ne deziros partopreni en la laboroj de la komisionoj.

19 h. Oficiala akcepto de la kongresanoj en Ministerio de Nacia Edukado.

22 h. Vizito tra Paris nokte.

Ĵaŭdon, la 1-an de aŭgusto.

9 h. Daŭrigo de la laboroj de la komisionoj;

10 h. 30 — Prelego pri la rolo de internacia helplingvo por faciligi la polan kulturon;

12 h. Oficiala akcepto en la urbdomo de Paris;

13 h. 30 — Tagmanĝo sur la rivero Seine en ŝipeto.

15 h. Daŭrigo de la laboroj de la komisionoj.

17 h. Ferma kunsido. Aprobo de la raporto.

20 h. 45 — Kabareda vespero proponata al ĉiuj kongresanoj senpage.

Vendredon 2-an de aŭgusto.

9 h. 30. Foriro por la vizito al Versailles: la kastelo, Trianon. Tagmanĝo en Versailles. Reveno kun vizito al la kastelo de la Malmaison.

Vespere, foriro al Marseille por la partoprenontoj de la Universala Esperanto Kongreso.

Ni petas la esperantistojn, ke ili bonvolu tuj rilati kun la gvidantoj de la popoluniversitatoj de siaj urboj kaj regionoj, por ke ili venu Parizon. Plej bone estu, ke la delegitoj al la Konferenco de la Popoluniversitatoj estu esperantistoj.

La diskutoj en la konferenco de la popoluniversitatoj povos okazi en la lingvoj franca, angla, kaj germana, sed la tradukoj okazos nur en esperanto.

Tiu konferenco estos do la unua provo de la eblecoj de Esperanto por internaciaj konferencoj, kies celoj estu tute apartaj de la esperantista propagando.

Estu konsciaj pri la graveco de nia eksperimento. Nepre, helpu nin!

Por la Organiza Komitato de la antaŭkongreso en Paris, kaj de la Unua Internacia Konferenco de la Popoluniversitatoj,

Pierre PETIT,
Prezidanto.

La KOKO Krias!

La vivo en la ses Kopenhagaj kluboj lastatempe tre vigliĝis. Agitis ioman konkuradon fondiĝo de *Komuna Konversacia Klubo* (KKK), interklubo kun 60-membra anaro, ĉefe el jam ekzistantaj lokaj aŭ landaj organizaĵoj. Motivis tiun novtipan klubon fortaj deziroj de multaj pri

- 1) interkluba kontakto,
- 2) senkondiĉa subteno al publikaj kursoj de la urbo Kopenhago,
- 4) seriozaj, kulturaj programoj,
- 5) eldono de valora, originala esp.-literaturo en Danlando.

Ĉiuj kvin frontoj estas atakitaj samtempe kaj kun nepra sukceso. La prezidanto de KKK, s-ino Kirsten Zacho, direktas la komunajn kursojn. Pri la 5a

punkto ĉiu ajn povas juĝi per la ĝisnuna aperigo de la imponaj, arte ekipitaj libroj en la KOKO-serio (*Poul Thorsen*: Rozoj kaj urtikoj; *K. Kalocsay*: Ezopa saĝo kaj *Johan H. Rosbach*: Homoj kaj riveroj).

Pri serioza kultura programo atestas la suba bildo. Nome, la 22an de februaro okazis diskutvespero kun la temo: *Ideologia signifo de Esperanto: Ĉu la internacia lingvo estas nur teknika rimedo de komunikado, aŭ ĉu ĝi estas esprimo de iu ideologia koncepto, se jes, de kiu?*

Por enkonduki la diskuton oni petis la opinion de sekvaj gravuloj en nia movado: Prof. *Ivo Lapenna*, redaktoro *W. Auld*, d-ro *A. Albault*, lektoro *Johan H. Rosbach*, *G. C. Fighiera*, K.K.S., kaj d-ro *F. Szilagyi*.

Neniu el la kontribuintoj volis nei, ke Esperanto havas ideologian signifon. Jen ni citas nur kelkajn vortojn de ĉiu el ili: *W. Auld*: „Teorie, jes, Esperanto

estas nur teknika rimedo de komunikado.” *A. Albault*: „...ni devas do konkludi jene: Esperanto estas ja esprimo de ideologia koncepto...”. *J. H. Rosbach*: „...estas, eble, malfacile ekspliki, de kiu ideologia koncepto la internacia lingvo estas esprimo”. *G. C. Fighiera*: „...ili ne komprenis, ke la ideo estas natura sekvo de la lingvo kaj ne inverse”. *F. Szilagyi*: „Esperanto estas ideala kulturmovado, kies celo estas peri kulturojn kaj ankaŭ estigi internacian kulturon”. *I. Lapenna*: „Sekve, kvankam Esperantismo ne estas ideologio, ĝi havas en siaj fundamentoj mem fortegan ideologian elementon: demokratian internacismon...”.

Sekvis longa, pensiga diskuto por kaj kontraŭ la t.n. interna ideo, sed pri detaloj ni ĉi tie devas rezigni (interesatoj petu ilin ĉe KKK, Randbölvej 4, Kopenhago F). Nur la *ideon* pri tia vespero ni volonte pludonas al aliaj kluboj.



Birthe Zacho voĉlegas la kontribuon de prof. dr. *Ivo Lapenna*. Maldekstre de ŝi: *Kirsten Zacho* (prez.), *Sv. Ziegler*, *Jens Palkentorp*, *Poul Thorsen*; dekstre, *H. V. Rasmussen*, *L. Vasiljeŝ*, kiuj legis la aliajn kontribuojn.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 31-a de marto 1957

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	2400	119.04
2.	Danlando	1910	1755	91.88
3.	Nederlando	4894	4435	90.62
4.	Hispanujo	2092	1895	90.58
5.	Finnlando	2687	2420	90.06
6.	Francujo	6575	5804	88.27
7.	Svislando	1910	1680	87.96
8.	Belgujo	1952	1678	85.96
9.	Svedujo	6895	5800	84.12
10.	Britujo	7351	6073	82.61
11.	Italujo	3620	2420	66.85
12.	Germanujo	6515	4210	64.62

13.	Brazilo	6985	4494	64.34
14.	Norvegujo	2113	1260	59.63
15.	Jugoslavio	3563	1510	42.38

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	580	520	89.55
2.	Sudafriko	230	205	89.13
3.	Aŭstralio	1025	898	87.61
4.	Urugvajo	325	255	78.46
5.	Novzelando	942	730	77.49
6.	Japanujo	1210	930	76.86
7.	Izraelo	290	220	75.86
8.	Kanado	500	360	72.—
9.	Islando	405	200	49.38
10.	Maroko	1061	400	37.70
11.	Aŭstrujo	1000	340	34.—

Du Reprezentantoj de la Bulgara Pentroarto

Sur tiu ĉi paĝo la legantoj vidas kelkajn bildojn de la bulgaraj pentristoj Ilija Beŝkov kaj Veselin Stajkov. Ambaŭ pentristoj, kiel ĉiuj progresemaj homoj kaj veraj talentoj rilatas favore al nia lingvo kaj movado. Pro tio, al mia peto, ili tuj kaj senkondiĉe konsentis, ke aperu iliaj verkoj en nia revuo.

Por faciligi mian taskon ili montris al mi multajn el siaj bildoj kaj lasis al mi la elekton.

La elektitajn bildojn la legantoj nun povas rigardi, ĝui kaj aprezi laŭ sia vidpunkto kaj gusto.

Muzikon kaj pentroarton oni ne povas kontentige interpreti per vortoj. Oni devas aŭdi la melodion kaj vidi la bildon por ekhavi ideon kaj eksenti ties valoron, belon kaj efikon.

Tiaspecaj verkoj parolas sen vortoj, sed per propra lingvo, kiu estas komprenebla por ĉiuj homoj.

Tial, mi povas skribi po kelkajn vortojn nur pri la artistoj mem.

Veselin Stajkov

La bulgara pentristo V. Stajkov estas naskita en urbo Peŝtera, la 31-an de julio 1906. Post studado en gimnazio en Plovdiv kaj Sofio, li eniris la Pentroartan Akademion. Tie li studis grafikarton ĉe prof. Vasil Zahariev kaj finis la Akademion en 1932. En la sama jaro li partoprenis la ekspozicion de la finintaj studentoj. En la ekspoziciitaj verkoj de la pentristo la publiko vidis la aperon de nova talenta artisto. Kaj vere en sia aprezo la publiko ne trompis sin, ĉar en la postaj jaroj la talento de Stajkov montriĝis per la verkoj, kiujn li kreis kaj per la ŝato kaj premioj, kiujn li ricevis pro sia arto.

Dum sia 25-jara krea vivo la pentristo verkis multajn memorindajn bildojn kaj partoprenis kun ili en multaj ekspozicioj en la lando kaj eksterlande.

Per konkurso Stajkov ricevis postenon ĉe la Ŝtata Presejo en 1933... per konkurso li veturis al Italujo por specializado en 1940; per konkurso li fariĝis docento ĉe la Pentroarta Akademio en 1944. Do, lia supreniro okazis ĉiam per konkursoj. Tiu cirkonstanco tre gravas

kaj parolas favore pri la artisto sen pluaj komentoj.

La arto de Stajkov estas originala kaj memstara. Laŭ temoj liaj bildoj plej ofte prezentas scenojn el la vivo de la laboranta popolo. Tiun popolon videble la pentristo amas kaj per simpatio prezentas en siaj verkoj. Pro tio ankaŭ la laboranta popolo ŝatas la verkojn de la pentristo V. Stajkov.

Ilija Beŝkov

I. Beŝkov estas naskita en v. Dolni Dăbnik en 1901. Li studis kaj finis la pentroartan akademion en Sofio en 1926. Nun li estas profesoro ĉe la sama supera lernejo.

Dotita per granda kaj originala talento li jam pli ol 35 jarojn uzas sian arton en batalo pro progreso kaj homa feliĉo. Li senlace kaj sentime atakas sociajn instituciojn, homojn kaj homajn malvirtojn: la tiranion, stulton, egoismon, monavidon, flatemon kaj filistrecon, hipokritecon kaj indiferentecon. Beŝkov estas pentristo por kiu la arto ne estas rimedo por gajno de mono aŭ por laŭdo kaj flato de la potenculoj. Por li, la arto



Il. Beŝkov.

Konkuro

estas armilo, per kiu li batalas por pli justa sociordo kaj pli da kompreno inter la homoj. Tial li ne kunlaboris kaj ne kunlaboras al ĉiuspecaj eldonoj kaj ne verkas laŭ mendoj pri ĉiaj temoj. En la pasinto li kunlaboris al la gazeto „Plad-ne”/Tagmezo/, kiu gazeto havis jenan moton: „Ĉiam justa, neniam neŭtrala”. Certe tiu moto estas karakteriza pri la pozicio de la karikaturisto mem. Liaj verkoj, kaj la kuraĝo montri ilin, ofte kaŭzis al la pentristo suferojn, persekutojn kaj eĉ realan danĝeron pri lia vivo. Li estis pro ili arestata kaj malliberigata. Sed Beŝkov ne ektimis kaj ne cedis de sia pozicio. Li tre bone sciis kaj scias, ke la plej facila vojo en la vivo kaj en la arto — estas laŭdi la potenculojn — kaj multaj el liaj kolegoj nur tion faras — sed li ankaŭ scias, ke ne en tio konsistas la tasko de la vera arto. Kaj li iras laŭ sia vojo — vojo ne facila — sed unika por inda homo kaj popola pentristo.

Por fini, mi proponas al la legantoj, ke



V. Stajkov:

Ŝtonministoj



V. Stajkov:

Boatriparo

PRI LA UNUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BOULOGNE-SUR-MER 1905

(Vidu Revuon „Esperanto” Okt. 1956 p. 151)

Pluraj Samideanoj skribis al mi post la publikigo, en nia Revuo, de la foto montranta multajn partoprenintojn en tiu historia Kongreso. Tre afable ili plenumis mian deziron kompletigi kaj korekti la nomaron sendante precizajn informojn kaj ankaŭ altvalorajn sciigojn koncerne plurajn pionirojn de nia Movado, mortintaj aŭ ankoraŭ vivantaj.

Pro tio kaj pro la ĉarmaj, la kortuŝemaj vortoj kiuj akompanis iliajn informojn, mi diras la ĉiuj: Dankon, elkoran dankon!

Jen iliaj nomoj laŭ la alfabeto vico:

Carl BARTHEL en Frankfurt a. M., Germanujo;

Kazimierz DOMOSLAWSKI en Pulawy, Polujo;

Ota GINZ en Kirjat Jam, Israel;

Lillian HOLT en Wien, Aŭstrujo;

G. M. HOUGHTON en Welwyn Garden City, Britujo;

Maurice LEWIN en Dunstable, Britujo.

G. D. LEWIS en Folkestone, Anglujo.

Paul NYLEN en Huddinge, Svedujo;

Frat. Leo TOLOZA en Beuron, Germanujo.

Malfacile estus resumi ĉiun el tiuj interesaj leteroj. Ŝajnis al mi preferinde grupigi la informojn en tri fakojn:

- Kiom da Samideanoj, ĉeestintaj la Kongreson en Boulogne-sur-Mer, ankoraŭ vivas?
- Kiu estas la Dojeno de la tutmonda Esperantistaro?
- Korektoj farendaj en la bildo kaj en la nomaro, p. 150 kaj 151 de „Esperanto” okt. 1956.

A. SAMIDEANOJ ĈEESTINTAJ LA KONGRESON 1905

ANKORAŬ VIVANTAJ

Unua listo estis publikigita en „Esperanto” (junio 1955, p. 178). Ĝi entenis nur kvar nomojn: Carl BARTHEL, Generalo BASTIEN, Gabriel CHAVET, Edmond PRIVAT.

Poste mi aldonis 7 nomojn, kaj F-ino Cécile Royer 3 (vid. Esperanto; okt. '56, p. 151).

Nun, laŭ la lastaj informoj ricevita, mi povas starigi la ĉi-suban liston entenantan 24 nomojn:

Carl BARTHEL, Generalo BASTIEN, K. BEIN (Kabe), P. BOULET, Ch. BRUNET, M. BUTIN, G. CHAVET, COMTE, Dr DAUZATS, S-ino DAUZATS, M. DORE, E. GASSE, GROSSET, L. HOLT, Ed. KUNHL, G. D. LEWIS, Dro G. MAILLARD, MERLATEAU, P. NYLEN, Ed. PRIVAT, F-ino Cécile ROYER, F-ino SCHÄFFER, Pastro WARO, W. WOYDE.

B. KIU ESTAS LA DOJENO DE LA TUTMONDA ESPERANTISTARO?

S-ro M. Lewin, kiu kreis la Klubon de Veteranoj, opiniis ke P. Nylen kaj mi mem, kiuj ambaŭ en 1892 eklernis Esperanton, estis la du Dojenoj.

Sed K. Domoslawski informis min, inter aliaj interesaj sciigoj, ke en Varsovio vivas ankoraŭ unu samideano kiu esperantistiĝis en 1892 kaj kiu ĉeestis la Kongreson en Boulogne-sur-Mer: S-ro Wacław Woyde. Tamen nek P. Nylen, nek W. Woyde, nek mi mem estas Dojenoj de nia Movado, ĉar en la fino de sia letero K. Domoslawski skribas: „En Polujo vivas ankoraŭ la plej malnova esperantisto en la Mondo, laŭ mia scio, nome Pastro Adam Gabriel FURMANIK, kiu esperantistiĝis en la jaro 1888”, kaj li aldonas tre interesajn sciigojn pri tiu malnova kaj respektinda Samideano, kiu verŝajne ne ĉeestis la Kongreson en Boulogne. Do oni povis opinii ke Pastro A. G. Furmanik estas

la unika vera Dojeno de Esperantistaro.

Tamen la afero ne estis finita!

Ĉar mi ricevis tre afablan leteron de S-ano Ota Ginz, per kiu li informis min ke vivas ankoraŭ unu pli malnova esperantisto! Jen kion li skribis al mi: „Laŭ mia scio, apartenas tiu gloro al S-ro F. V. LORENZ, ĉeĥa esperantisto, lerninta nian lingvon en 1887 kaj eldoninta la unuan ĉeĥan Esperanto-lernolibron jam en 1890. Li vivas en Brazilo, ĉiam aktiva. Nun li preparas antologion de Brazilaj prozo.”

Jen unu rekordo certe ne superebla. 1887 la jaro mem en kiu aperis la unua lernolibro de Zamenhof!! Ŝajnas ke nun ne necesas serĉi plue. Do ni devas respekte kaj korege saluti tiujn du tre malnovajn samideanojn: La Dojenon, S-ro F. V. LORENZ kaj la Vic-Dojenon, Pastro A. G. FURMANIK! Gloro al ili!

C. KOREKTOJ FARENDAJ SUR LA BILDO KAJ EN LA NOMARO

Sur la bildo

Forstrecki la numeron 98, erare lokita en tiun lokon.

Skribi la ĉi-subajn numerojn:

en la unuan vicon

5 sur la sunombreton de la S-ino sid-



Il. Beškov:

Gloro

ili konsideru, ĉu estus agrable al ili enfali inter la vipitaj nesimpatiaj herooj de la karikaturisto. Se la rigardantoj konfesas, ke tio tute ne estas agrable — tiam, ŝajnas al mi, ke Beškov per sia arto atingas sian celon.

Metodi Panĉev



Il. Beškov:

Publiko

Por la rubriko „Monda Galerio” ni deziras ricevi taŭgan materialon, kaj invitas la samideanojn sendi al ni mallongajn artikolojn pri sialandaj artistoj, kun specimenoj de ilia verko. Nepre akiru permeson reprodukti la verkojn, kiam tio estas leĝe necesa.

MULTAJ JAM FARIS

Ĉu Vi?

Se ne, mendu hodiaŭ libreton de Atestiloj kaj varbu

APOGANTOJN DE U.E.A.!

anta maldekstre ĉe la rando de la bildo.

10 sur la blankan robon inter 9 kaj 11.
13 anstataŭ 131 sub la piedojn de Kol.
Dro Pollen, inter 14 kaj 15.

en la duan vicon

38 sur la S-ron malantaŭ kaj inter 11 kaj 12.

33 sur la junan altkreskan S-ron malantaŭ Zamenhof (1)

35 sur la S-ron malantaŭ Michaux (3).

25 anstataŭ 29 sur la S-ron kiu staras malantaŭ kaj inter 18 kaj 19.

en la mezan parton

50 sur la S-ron malantaŭ 42.

60 sur la S-inon inter 59 kaj 79.

89 sur la S-inon malantaŭ 49, inter li kaj 50.

en la supran parton

93 sur la S-inon maldekstre inter 103 kaj 90.

88 sur la S-ron malantaŭ kaj inter 41 kaj 49.

98 en la lasta vico super la kapo kun pajla ĉapelo kaj lipharoj sen barbo, kiu elrigardas inter du sinjoroj, 64 milimetrojn de la maldekstra rando de la bildo.

83 anstataŭ 93 sur la bruston de la S-ro kiu staras du vicojn malsupre 98.

105 en la lasta vico, inter 100 kaj 106.
133 tute dekstre en la lasta vico, sur unu junulon, duone tranĉita de la rando de la bildo, kiu staras ĉe unu S-ino kun blanka ĉapelo.

Kelkaj eminentuloj kaj multaj aliaj kongresanoj ne estas en tiu bildo. Ili estas en foto presita sur poŝtkarton, kies multaj ekzempleroj estis venditaj. Sed la figuroj estas tre malgrandaj kaj ne netaj. Tamen sur tiu poŝtkarto oni povas rekonii: Prof. Boirac, Generalo kaj S-ino Sebert, D-ro Javal, S-ro Bourlet, S-ro Deligny, S-ro Rousseau, k.t.p. Tre be-

daŭrinde ili ne estas sur mia foto.

En la Nomaro

Forstreki la numeron 109 kaj la nomon de Prof. Boirac, ĉar li ne estas en la bildo.

Skribi la nomon: Margaret Jones anstataŭ Junck ĉe la nro. 34.

Almeti la numerojn kaj la nomojn:

13 Kol. D-ro Pollen;

29 S-ro Ahlberg;

33 S-ro K. Bein (Kabe);

50 S-ro Otto Simon;

52 S-ro J. Rhodes (laŭ la opinio de P. Nylen);

60 S-ino Blaise

78 Prof. Cart;

88 S-ro Bicknell

89 S-ro Esselin

90 D-ro Dor

105 J. Rhodes (laŭ la opinio de C. M. Houghton);

133 Liceano Merlateau.

D-ro G. Maillard

UNIVERSALA FRAMASONA LIGO

Tiu organizaĵo estas kreaĵo de Esperantistaj Framasonoj kiuj kunvenis dum la unua Universala Kongreso de Esperanto, en Boulogne-sur-Mer, en la jaro 1905.

Gia celo estas doni eblecon al Framasonoj apartenantaj al diversaj regulaj obediencoj, interkonatiĝi kaj interrilati trans la landlimojn.

La Estraro de U.F.L. agnoskas la valoron de Esperanto por tiu celo, kaj ĝi atendas de la esperantistaj framasonoj, ke ili aliĝu al la Ligo kaj aktive partoprenu en ĝia laboro.

La Esperanto-Fako de la belga Sekcio de U.F.L. kunvenis la 23an de februaro 1957. Ĝi decidis fari specialan propagandon inter la esperantistaj Framasonoj, por ke ili aliĝu al la Kongreso de U.F.L., kiu okazos en Bruselo, dum la Universala Ekspozicio, de la 29a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro 1958.

Estas dezirinde ke granda nombro de esperantistaj Framasonoj ĉeestu la Kongreson, por ke povu esti organizata aparta kunsido de la Esperantistoj. La ĝenerala temo de la Kongreso estas: „Defendo de la Homo”. La esperantistaj Framasonoj bonvolu prepari referatojn pri tiu temo. La diversaj raportoj estos diskutataj dum la faka esperantista kunsido, kaj la konkludoj prezentataj al la Ĝenerala Plena Kunsido de la Kongreso.

Diversaj aranĝoj estas antaŭvidataj: vizitoj al la Ekspozicio, akcepto en la Urbdomo, k.c. Bona kaj malmultekosta loĝado estas garantiata al la fruaj aliĝantoj.

La esperantistaj Framasonoj nepre uzu tiun okazon montri sian forton en tiu organizaĵo kreita de iliaj antaŭuloj, kaj samtempe ĝui agrablan restadon kun amikoj el la tuta mondo.

Informoj estas haveblaj de U.F.L., Belga Sekcio, Esperanto-Fako, 8, rue du Persil, Bruselo (Belgujo).

John Francis:

Momentfoto

La strato konsistis plejparte el oficej-konstruoj, kvankam granda teatro rompis la monotonon, kaj la regula fluo de hejmenirantaj oficistoj iom perturbiĝis kaj faris devion, kie grupo de raŭke blasfemantaj laboristoj staris ekster la ĉefoficejo de sia firmao atendante la pagon, ĉar estis vendredo. Ili fordistris la enuon de atendado per reciprokaj insultoj, kaj per admirajfegoj post la pli belaj el la preter-rapidantaj oficistinoj, ridante je la embarasiĝo kaj ŝajna kolero de siaj viktimoj.

Subite tamen ilia tumultemo ĉesis kaj la grupo mute rigardadis la virinon, kiu ne lasante la trotuaron glitis pli ol promenis inter ilin. Ŝiaj nigraj haroj estis kombitaj kun severa rekto for de ovala vizaĝo, kies seren senesprimon dominis oblikvaj brovoj super nigre ŝminkitaj okuloj; kaj kiam ŝi preterpasis ili rimarkis, ke la jupo, kiu dividiĝis malantaŭe kun liberala malstrikto, rivelas la fenomenajn kurbojn de ŝiaj kruroj, kies elastan allogon la diafanaj ŝtrumpoj nur emfazas.

„Kriste,” spiris unu el la laboristoj kun kruda admiro, „jen kru-regoj!”

Alia respondis, ne rigardante sian kamaradon:

„Kion vi atendaĉas? Ŝi estas balerino ja.”

Je tio la aludito turnis sin kun radiant rideto, kaj ektenante la jupon kun gracia gesto genuflekse agnoskis la klarigon. Post momenta ekgapo la parolinto svingis la ĉapon ĝistalien en profunda riverenco samtempe grincante “Ĉapojn!”; sed liaj kamaradoj anticipinte la ordonon jam staris ĉapojn ĉebruste ridetante sian miran plezuron.

La hejmenirantaj burĝetoj ne haltante tamen turnis la kapojn por rigardi senkomprene la strangan interludon.



La Malamiko

Komedieto en unu akto

de

Božidar Trudić

(Fino)

La komentariisto. — Kia stranga letero!... Rozkolora... (*Edmondo flaras la leteron*). Bonodora... Sendinto?... Terura afero! Sur la dorso de la letero estas desegnita koro trapikita per sago! Sen ia dubo, ĝi estas ama letero!

Edmondo (malespere ŝalas en la ŝotelon.)

La poŝtisto (okulsigas al la publiko kaj al Eva). —

Trafis ni la ĝustan lokon!

Li ekmordis la fiŝokon!

(*Eliras en triumfo, salutante Evan per la mano.*)

Eva (ĉe la telefono, rapide). — Nun mi devas rapide malaperi kaj doni al li favoran okazon por malfermi la leteron nemalfermitan... Jes, ĝis la revido, Petro! (*Demetas la aŭdilon. Por si mem.*) Li estis tiel trafita per tiu bato, ke li tute forgesis mian kajeron. (*Eniras sian ĉambron.*)

La komentariisto (anstataŭ Eva, abrupte). — Pardonu, kara Edmondo, sed mi devas tuj eliri. Mi devas havi urĝan rendevuon kun sinjoro Keli. Temas pri gravaj aferoj. Mi revenos ĝustatempe por la tagmanĝo. Ĝis la revido!

Edmondo (etendas la manon kun la letero, sed Eva ne volas vidi tiun geston).

Eva (foriras).

(*La mano de Edmondo malrapide malleviĝas.*)

La komentariistino (flustre, sed sugestive). — Sinjoro Milton, malfermu la leteron!... Mi scias ke tia gesto ne decas al via digneco, sed... ĝi konvenas al nia plano...

La komentariisto (interpretas la internan batalon de Edmondo). — Kion fari?... Malfermi la leteron?... Fi, kia honto!... Sed ŝi foriris al la rendevuo!... Kun Petro Keli!... Eble la letero estas de li?

La komentariistino (kiel supre). — Malfermu, malfermu la leteron!...

La komentariisto. — Mi devas scii!... Tiu ĉi netolerebla stato devas finiĝi!... (*Decidite*). Oni taksu min kiel ajn, sed — mi malfermos la leteron!

Edmondo (per decida gesto deŝiras la koverton kaj elprenas la leteron, kiun li provas legi. Fine li rigardas la subskribon. Murmuras). — „Via Petro”.

La komentariisto. — Mi komprenas absolute nenion!... Kia lingvo!...

Edmondo (legas malrapide kaj kun

malbona akcento). — „Ne... ali... rebla samce... la... nino mia...” M-m!... Neali-rebla!...

La komentariisto — Kion ĝi povus signifigi!... Certe ĝi estas ia ama esprimo!... Nu, ni ekserĉu ian vortaron!

Edmondo (leviĝas, serĉas inter la libroj de Eva, prenas unu vortaron kaj legas erare). — „Esperanto-franka vortaro”.

La komentariisto. — Nu, ĝi ankaŭ povos servi... Nun ni trovu tiun strangan vorton...

Edmondo (ŝoliumas la vortaron irante al sia kabineto). — Na... najlo... nazo... ne... nebulo...

La komentariisto. — Kio ja estas tio?! Neali — sed tiu vorto ne ekzistas en la vortaro!... Ni provu kun la alia vorto.

Edmondo (ŝoliumante en la vortaro). — Sabato... sakramento... salato... salivo... sambuko... samovaro...

La komentariisto. — Jen! Ankaŭ tiu vorto ne ekzistas!...

Edmondo (disreviĝinta ĵetas la vortaron sur la tablon.)

La komentariisto. — Ne, per tiu ĉi metodo mi atingos nenion!... La vortaro ne helpas... Kial en la vortaro ne troviĝas ĉiuj vortoj?!...

Edmondo (cerbumas).

La komentariisto. — Oni diras ke Esperanto estas tre facila lingvo. Ĝis nun mi tion ne povis konstati!... Kontraŭe!... Sed... eble ĝi havas ian specialan sistemon?... Vole — nevole, mi devas trastudi ĝian gramatikon...

Edmondo (leviĝas de la seĝo, transiras en la ĉambron de Eva kaj serĉas denove inter ŝiaj libroj legante la titolojn). — „Krestomatio”... „Lingvaj respondoj”... „Normandaj rakontoj”... „Gramatiko de Esperanto”. — Alfabeto: a, bo, co, ĉo, do...

Mallumo iom post iom envolas la scenejon.

La komentariisto. — Tiel forpasadis tagoj... Sinjoro Edmondo pasigis siajn posttagmezojn en fervora lernado...

(*El la mallumo aŭdiĝas voĉo de Edmondo:* „Mi parolas, vi parolas, li, ŝi, ĝi parolas...” *La voĉo perdiĝas.*)

La komentariisto. — Li eĉ kunportis la gramatikon en sian oficejon, kie li kaŝe studis la lingvon...

(*Aŭdiĝas bruoj de oficejo: skribmaŝina tajpado, telefonoj, voĉoj...* *La bruoj iom post iom malaperas; ĝin anstataŭas la mallaŭta voĉo de Edmondo:* „Mia amiko, de mia amiko, al mia amiko...”)

La komentariisto. — En tramo...

(*Sonoj de tramo, post tio la voĉo de Edmondo:* „Prefikso mal: malamiko, malpermeso, malaperi...”)

La komentariistino. — en aŭtobuso...

(*Sono de aŭtobuso, poste la voĉo de Edmondo:* „...dek unu, dek du, dek tri...”)

La komentariisto. — ...en vagonaro...

(*Bruoj de vagonaro**) *poste la voĉo de Edmondo:* „Korelativoj: kiu, kio, kia, kial, kiel, kie...”)

La komentariistino. — ...ĉie li persiste lernis kaj lernis.

La komentariisto. — Ekde la unua momento surprizoj venadis unuj post la aliaj...

(*La voĉo de Edmondo:* „Sentema, aĝema, laborema... Vidinda, leginda, aŭdinda...”)

La komentariisto. — Tiel li entuziasmiĝis por la lernado, ke li preskaŭ forgesis kial li komencis tion fari...

(*La voĉo de Edmondo:* „Mi estis legonta, vi estis legonta, li estis legonta...”)

La komentariisto. — De tempo al tempo tamen la terura letero premis lian animon, sed tiu memoro nur pliakrigadis lian decidon havigi al si la bezonatan pruvon pri la malfideleco de sia edzino... Fine, post kelkaj semajnoj de streĉita hejma situacio, angoro kaj necerteco, venis la tago de displektiĝo...

(*La scenejo lumiĝas iom post iom.*)

Edmondo (paŝas tra la kabineto parolante kun si mem.)

La komentariisto (interpretas). — Ŝajnas al mi ke nun mi estas preta... Mi eksciis ĉion necesan por kompreni la leteron... Samtempe mi konvinkiĝis ke mi ne pravis rilate Esperanton... Esperanto estas lingvo kun certa estonteco, por mi nun tio estas tute klara afero... Sed nun ni vidu tiun malfeliĉan leteron... Mi konkeris la lingvon, sed eble mi perdis la edzinon...

Edmondo (haltas, elpoŝigas la leteron kaj legas). — „Nealirebla samcelanino mia...” (*Pripensas.*) „Ne-al-ir-ebla”... Nun mi komprenas... Sed, stranga afero, tio ne estas ama esprimo!... „Sam-cel-an-ino”... Ankaŭ ne en malbona senco... Nu, ni vidu plue... „Kun ne-pri-skrib-ebla mal-pacienco kaj sci-vol-emo mi estas atend-anta la rezultojn de nia t.n. am-aventuro, kiu nature, estas nur ŝajna kaj fiktiva, kaj kiun ni devis roli por devigi vian edzon trastudi nian lingvon...” (*Kun plezuro kaj plenespero*). „Mi estas certa, se li iam komprenos tiun ĉi leteron, ke li fariĝos amiko de nia ideo... Mi esperas ke li ĝuste komprenos nian provon kaj ke ne povos okazi miskompreno pri miaj sentoj al vi, kiuj estis kaj estos ĉiam altestimaj, sinceraj kaj amikaj. — Eterne via Petro”. (*Enpensiĝas. Parolas malrapide kaj necerte, kelkfoje kun erara akcento*). — Tiel do, mi estis viktimo... de lerte kombinita ludo!... (*Ridetas feliĉe*). Sed mi ne koleras... Kontraŭe!... Mi estas feliĉa!... Anstataŭ unu, mi havas nun... du pruvojn!... Unue... ke mia edzino estas fi-

*) Plej bone estus havi tiujn sonojn registritaj sur magnetofonan rubandon.

dela... kaj due... ke Esperanto vere estas lerninda lingvo... (Paŭzo). Sed... kiamaniere nun fini la aferon?... Ĉu simple konfesi... ke ili venkis, aŭ...? (Pripensas.) Tiu ĉi lasta alternativo... ŝajnas al mi... pli konvena... (Decidite) Jes, bona ideo! (Sonorigas.)

Ana (eniras).

La komentariisto. — Sinjoro deziras?

La komentariisto. — Ana, preparu mian kofron, sed rapide!

La komentariisto. — Sinjoro estas vojaĝonta?

La komentariisto. — Jes. Tuj.

La komentariisto. — Sed la sinjorino nenion scias pri tio!

La komentariisto. — Ne parolu multe, sed rapidu! Mi urĝas. Kaj venigu taksion!

La komentariisto. — Laŭ via deziro, sinjoro.

Ana (eliras).

Edmondo (malfermas ĉiujn tirkestojn de la skribtablo kaj ŝrankoj, elprenas diversajn aĵojn kaj amasigas ilin ĉien: sur la tablon, fotelon, plankon ktp. por ŝajnigi seriozajn preparojn por vojaĝo). — Nu, mi esperas... ke nun ĉio estos... tre... konvinkiga!... Nun venos mia vico!...

Eva (eniras rapide en mantelo kaj haltas ĉe la pordo, videble ekscitita.)

La komentariisto. — Edmondo!... Kion vi faras?... Ana diris al mi, ke vi preparas vin por vojaĝo?...

La komentariisto (kvazaŭ indifere). — Jes, mia kara... Mi vojaĝas!

La komentariisto. — Sed... kien?

La komentariisto. — Kien ajn... Tute egale!...

La komentariisto. — Sed kiom longe daŭros via vojaĝo?

La komentariisto. — Nedefinite longe... Alivorte, mi ne revenos plu!...

Eva (malespere enkuras la kabineton.)

La komentariisto. — Vi ŝercas... Vi intencas forlasi min?

La komentariisto. — Kaj eĉ por ĉiam, karulino mia!

Eva (levas la manojn al Edmondo kvazaŭ por reteni lin.)

La komentariisto. — Sed kial? Kion mi faris al vi?...

La komentariisto. — Mi scias ĉion, Eva!... Vi trompas min... kun via amiko Petro Keli... Mi havas pruvon en la manoj...

Eva (plorsingultas).

La komentariisto. — Sed vi ne komprenis tiun malbenitan leteron!... Ĉio estis nur ŝerco... kun la intenco instigi vin...

La komentariisto. — Sufiĉe, kara mia... Ŝerco aŭ ne, mi decidis liberigi vin de mia teda ĉeesto kaj lasi vin sola kun via amanto...

Eva (korsire ekkrias ĵetante sin sur lian bruston.)

La komentariisto. — Edmondo, ne faru tion!... Vi estas viktimo de miskompreno!...

(Frapoj sur la pordo. Eniras Petro.)

Edmondo (ŝiriĝas el ŝia ĉirkaŭpreno.)

La komentariisto (interpretas geston de Edmondo). — Jen, venis via... Petro. Iru al li!

Eva (turnas sin al Petro, malespere.)

La komentariisto. — Jen kion ni faris, Petro!... Li volas forlasi min!... (Krio). Li forlasis min!...

Eva (falas en la fotelon konvulsie plorante).

Petro (aliras al Edmondo, serioze kaj iom penteme).

La komentariisto. — Aŭskultu, sinjoro Milton!... Mi ĵuras per mia honorvorto, ke ĉio estis nur ŝerco kaj ke mi eĉ ne unu momenton ĉesis respekti vian edzinon, kiel decas al...

Edmondo (gestas malpacience).

Ana (eniras kun la kofro).

La komentariisto. — Via kofro estas preta, sinjoro.

La komentariisto. — Bone, Portu ĝin eksteren. (Ana eliras).

Edmondo (aliras al Eva).

La komentariisto. — Nu, Eva, adiaŭ!... Mi esperas ke vi estos feliĉa kun via elektito...

Eva (furioze ĵetleviĝas kaj ekkuras al Petro). — Kaj por ĉio vi kulpas... Nur vi!... Vi tiel infektis min per tiu... malbenita lingvo, ke mi neglektis mian hejmon, mian edzon, miajn devojn!... Vi tiel blindigis min, ke mi eĉ ekhavis tiun teruran ideon skribi tiun leteron, kiu tute maltrafis sian celon!... Jes, nur vi estas kulp!... Vi detruis mian vivon, vi ruinigis mian feliĉon!... For de antaŭ miaj okuloj!... Ke mi neniam revidu vin!... (Falas en la fotelon kun la kapo en la manoj.)

Petro (konfuzita kaj tuŝita). — Sed... Eva... ĉu mi ne diris, ke la entrepreno povus esti danĝera?... Sed vi tiel insistis, ke mi konsentis skribi tiun leteron...

Edmondo (observas la scenon kaŝe ridetante).

Eva (singultas).

Petro (ne ricevinte ian ajn respondon eliras silente el la kabineto kaj aliras al la pordo en la alia ĉambro).

Edmondo (subite ekparolas esperantlingve). — Atendu... nur unu momenton..., sinjoro Keli!...

Petro (turnas sin surprizite).

Eva (kun konsternita mieno levas la kapon).

Edmondo (malrapide). — Ŝajnas al mi... ke vi... tro rapide... kapitulacas!...

Eva (leviĝas malrapide, fikse rigardante Edmondon).

Petro (revenas malrapide, kvazaŭ fascinita).

Edmondo. — Belaj adeptoj... de via ideo... vi estas!...

Eva kaj Petro (rigardas mute unu la alian).

Edmondo. — Vi bone... komencis... sed vi... malbone... finis la aferon... Sed ĉio restos... inter ni...

Eva (preskaŭ ne kredante siajn orelojn). — Edmondo!... Vi tralegis la leteron!... Vi komprenis ĝin!... Kaj vi lernis?...

Edmondo. — Jes... Mi komprenis... Kaj la rezulto estis... tute laŭ via plano...

Eva (feliĉe). — Petro!... Mi sukcesis!... Mia ideo sukcesis!... Li fariĝis esperantisto!... (Kuras en la ĉirkaŭprenon de Edmondo.)

Edmondo. — Kaj... ŝajne... pli fidela... ol vi!...

Petro. — He, kion fari!... Ŝajnas, ke kelkfoje propra feliĉo estas pli grava ol komuna afero...

Edmondo. — Ĝuste tio... estas malbona!... Por grandaj ideoj... oni devas... oferi sin!... Kaj Esperanto meritas... tiajn oferojn!...

Eva (liberiĝas el la ĉirkaŭpreno). — Edmondo!... Petro!... La unuan fojon en mia vivo mi estas vere feliĉa!... (Riproĉante). Kaj kial vi ŝajnigis tiun disiĝon kaj vojaĝon, Edmondo?

Edmondo. — Por montri al vi... ke mi ankaŭ... scipovas aktori!... Kaj por puni vin... pro tiom da noktoj... de zorgoj kaj maldormo!...

Petro (ĉiam propagandisto). — Kaj kion vi nun opinias pri nia propono pri enkonduko de Esperanto en lernejojn?

Edmondo. — Morgaŭ mi portos... tiun proponon... al sinjoro la ministro... kun speciala rekomendo.

Petro kaj Eva. — Hura! Kia sukceso!... La mondo aŭdos pri nia venko!

Ana (eniras).

La komentariisto. — La taksio estas ĵus alveninta, sinjoro.

Edmondo. — Ne, Ana... Mi ne vojaĝos... Mi ŝanĝis mian opinion...

Ana (rigardas lin gape).

La komentariisto. — Nu, kio estas, Ana? Vi konsterniĝis ĉar sinjoro Milton parolas esperante? — Baldaŭ vi ankaŭ devos komenci lerni tiun lingvon, alie... por vi ne estos plu loko en ĉi tiu domo!

(Ana estas elironta. La pordo malfermiĝas.)

La poŝtisto (eniras). —

Kun la pordo malfermita, enir' estas permesita!

Eva (ĝoje). — Venu ĉi tien, oĉjo poŝtisto!

La poŝtisto (ekvidinte Edmondon sku-iĝas kaj eksilentas).

Edmondo (ridetante). — Nu, ĉu vi ne aŭdis, samideano poŝtisto?

La poŝtisto (gapas).

Eva (aliras lin). — Ne miru kaj ne timu! Sinjoro Milton fariĝis nia amiko! (Gaje). Nun verŝu viajn versojn!

La poŝtisto. —

Min mirakloj superŝutas kaj pro tio — mi nun mutas...

Ĉiuj (ridas).

Eva. — Nu, kion vi nun alportos al mi?

La poŝtisto. —

Sen la koro kaj sen sago — leteron el Kopenhago!

Ĉiuj (ridas).

Eva (malfermas la leteron). — Aliĝiloj por la kongreso! (Petoleme). Nu, kara Edmondo, ĉu vi nun permesos al mi viziti la kongreson?

Edmondo. — Permesi al vi...? — Tute ne!... Ĉar... tiun ĉi fojon... al la Kopenhaga kongreso... NI IROS ĈIUJ KUNE!

(Ĝeneralaj ĝojoj kaj hura-krioj. Ĉiuj premas la manojn unuj al la aliaj. Ankaŭ la gekomentariistoj malsupreniras de siaj seĝoj kaj intermiksas sin en la ĝeneralan tumulton.)

La kurteno (malrapide falas).



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,

Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

LABOR-KAMPO EN NEDERLANDO

Permesu al mi, vin konduki al la vilaĝo Kerkwerve, kiu situas en la poldero de Schouwen en Okcidenta Nederlando.

Estas novembro 1953, preskaŭ tuta jaro post la inundo, sed ankoraŭ oni elpumpas la marakvon ĉar nur en aŭgus-



to oni sukcesis ripari la digon.


Kia detruado! El la 210 domoj en la paroĥo 117 aŭ tute disfalis aŭ ne plu estas ripareblaj dum preskaŭ ĉiu alia domo suferis iom gravan difektiĝon, sed feliĉe en Kerkwerve nur du homoj perdiĝis el la mil okcent dronintaj en la regiono. Frostiga nebulo blovas trans la polderon; anstataŭ velkintaj folioj miloj da putrintaj mituloj pendas de la arboj, stranga muziko kiam la vento tintadas la senvivajn klapojn.

La kampoj estas nigra ebenaĵo el ŝlimo kun lagoj de marakvo; necesas pli ol kvin jaroj por forigi la tutan salkvanton, kvankam iaj rikoltoj ebligis post du jaroj.

Jen amaso da brikoj, kaj sub ĉiu falinta briko kaŭras krabo, aŭ deko da kraboj diversgrandaj ĝis 3 centimetrojn. Jen, en ĝardeno kuŝas la tuta tegmento de domo, kiu tien flosis, sed ne de la proksima domo, kiu ankoraŭ staras kun muro elfalinta kaj kun 10–20 centimetroj da kot-aĉo sur la planko.

Ankoraŭ neniu loĝas en Kerkwerve, sed ĉu mi eraras? en tiu domo oni jam riparitis la fenestrojn, nun estas kurtenoj kaj vazo da floroj, dum afabla maljunulino alportas akvon de la publika akvovagono kiu staras surstrate.

Ĉie oni vigle laboras, forportas rubaĵon kaj koton, faligas difektitan domon aŭ riparas muron. Sed kie ni troviĝas? Ĉu la turo de Babelo? Minimume kvar lingvoj naciaj aŭdiĝas en Kerkwerve, kaj ankoraŭ Esperanto.



Inter la vilaĝanoj laboras gevolontuloj de du apartaj internaciaj laborkampoj kaj en la proksimaj vilaĝoj laboras tri aliaj internaciaj movadoj. Kvankam estas mezvintre ĉirkaŭ okdeko da ĝejnuloj helpas purigi domojn k.t.p. kaj ili venis el la tuta mondo.

Koncerne ok militrezistantojn el Nederlando kaj Usono mi menciis nur, ke ĉiu estas aŭ masonisto aŭ ĉarpentisto, ili estas sufiĉe lertaj kaj ne mankas al ili laboro.

La alia movado, kiu tie ĉi faras la simplan laboron sed ankaŭ entreprenas konstruadon aŭ alian metian laboron kiam tio necesas, nomiĝas Service Civil International, kaj konsistas el dudeko da ĝejnuloj, kaj unu du grizbarbuloj, el sep fremdaj landoj.

Abder, la nuna gvidanto, estas mahometano el Alĝerio. Li ŝatas la amikecon, la internan ideon de S.C.I., sed estas malfacile en S.C.I. servadi en la patrolando. Tial li venis al Nederlando kaj jam regas la lingvon.

Ann estas angla studentino, jam okfoje ŝi partoprenis laborkampojn en Britujo, sed estas ŝia unua vojaĝo eksterlandan, dum 18-jara Ineke venis el proksima vilaĝo kiu ne inundiĝis, kaj jam restis plurajn monatojn en nia internacia grupo.

Junaj laboristoj venis de svisa fabriko sed povis resti nur dum du semajnoj kiel ankaŭ 65-jara Ernesto kiu estas kuracisto en Germanujo kaj dum mallonga ferio venis nin vidi.

Bob kaj Ann Stowell estas geedza paro el Usono, ili ŝparis la monon por vidi Eŭropon kaj aliĝis al S.C.I.-laborkampo en Suda Italujo kie ili helpis konstrui lernejon en izolita kaj ankoraŭ primitiva distrikto. Kiam tiu fermiĝis ili venis al Nederlando, post nelonge revenos hejmen al propra pres-entrepreno kaj bieno kie najbaro prizorgas la unusolan bovinon. (daŭrigota)

Thomas J. Woodall

JUNULARA RONDO „ZAMENHOF” EN URUGVAJO

En nia Urugvaja Esperanto-Societo kreiĝis en februaro junulara fako, sub la nomo „Junulara Rondo Zamenhof”.

Nia nova Rondo jam aktive funkcias, kaj laŭ la Regularo aprobita de la Societo ĝi ĝuas internan aŭtonomecon laŭ propra regularo. Ĝia sidejo estas en tre konvena loko, aparte de tiu de la Societo; la adreso estas: Gabriel Perieira 3036, Montevideo.

Estas membroj de Junulara Rondo Zamenhof ĉiuj societanoj, kiuj tion petas. Tiuj, kiuj estas malpli ol 25-jaraj pagas neniun krom-kotizon por tio, sed el iliaj kotizoj al la Societo nia propra kaso ricevas 25 %. Societanoj pli ol 25-jaraj pagas al ni rekte kotizon de ĉ. 2.5 steloj, monate.

Unua numero de nia organo „La Juna Voĉo” aperis en februaro, kaj ĝi aperas ĉiumonate. Krome, ni havos dupaĝan konstantan rubrikon en la kvaronjara oficiala organo de la Societo.

Nicolàs Grab

JUNULARA FAKO DE HUNGARLANDA ESPERANTO-KONSILANTARO

La hungara esperantista junularo daŭrigas sian laboron en la kulturhejmoj kaj en la lernejoj. Estas planata por la 9-a de majo Renkontiĝo de budapeŝta esperantista junularo. Grava hungara junulara gazeto „Magyar Ifjúság” (Hungara Junularo) publikigis grandan artikolon favoran pri Esperanto en februaro. La hungarlingva artikolo enhavas interalie ankaŭ gramatikan parton. La intereso pri Esperanto estas grandega en nia lando inter la junularo.

Ni sendis petskribon al Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo, en kiu ni esprimis nian deziron partopreni la Festivalon en Moskvo kaj tie la esperantistan kunvenon. Estas eble ke ni povos sendi delegiton al la 13-a Internacia Junular-Kunveno en Avignon.

Imre Ferenczy,

Junulara Sekretario de HEK.

MALLONGAJ INEORMOJ

* La Esperanta balo de nia sarlanda sekcio en Hamburgo bone sukcesis. Poste, dum la jarkunveno de Germana Esperanto-Junularo en Neustadt en marto Sarlanda Esperanto-Junularo aliĝis al Germana Esperanto-Junularo, kies nova estraro konsistas el: Richard Reuchlin (prezidanto), Günther Becker (vicprezidanto), Waltraud Mork (sekretariino), Helmut Walter (kasisto), Johannes Kadam (koresponda servo). En la venonta numero sekvos raporto pri la menciita jarkunveno de GEJ.

* La kotizo de la 13-a Internacia Junular-Kunveno enhavas bileton al teatro-prezentadoj kaj du ekskursojn vere belajn en regiono, kie ĉiu ŝtono estas historia memoraĵo. Ĉijare ne estos tolerataj senpagaj restadoj.

* En la gazeto „Studentoj en la mondo”, monata organo de „Internacia Unuiĝo de la Studentoj”, publikigata en Prago kaj aperanta en ok lingvoj kaj sendata al pli ol cent landoj, aperis en la decembra numero artikolo pri Esperanto de Ronald Lynn.

Tra la mondo

● **Revigliĝas Esperanto-movado en Ĉinujo.** Ekde 1956 Ĉina Esperanto-Ligo denove komencis sian laboron kun subteno de La Asocio de Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando. En tiu jaro ĈEL sendis delegitojn al eksterlandaj esperantistaj kongresoj: unu al la 41a U.K., alian al la 4a Pollanda Esperanto-Kongreso. Reveninte Ĉinujon, la delegitoj publikigis plurajn artikolojn en grandaj ĵurnaloj, akcentante la rolon de Esperanto por intimigi popolanojn en diversaj landoj kun malsamaj intereso, religiaj kredoj kaj politikaj tendencoj. Kursoj okazas en diversaj urboj: Pekino, Ŝanhajo kaj Ĉungking, kaj en universitatoj en Pekino kaj Tienzin.

● **Dramo de Ibsen prezentita en Esperanto.** La 20an de aprilo 1957 sur la scenejo de Malá scéna en Smečky, Verda Ĉaro de Julio Baghy prezentis tradukon de la konata dramo de Ibsen: NORA (Hejmo de pupoj). Ni esperas doni plenan raporton en nia proksima numero de „Esperanto”.

● **Nova poŝtmarko kun esperanta teksto.** Okaze de la 70-jara datreveno de la Esperanto-movado kaj la 50-jara datreveno de Bulgara Esperanto-Asocio, aperos en Bulgarujo dum julio nunjara poŝtmarko kun bildo de Zamenhof kaj esperanta teksto.

● **Ekspozicio de la Libro kaj Tutmonda Esperantista Presado.** En la Urba Biblioteko de Milano (Italujo) estis aranĝita de la 19a de januaro ĝis la 9a de februaro, en la kadro de la manifestacioj okaze de la Ora Jubileo de la Milana Esperanto-Grupo, unua Ekspozicio de la Libro kaj Tutmonda Esperantista Presado. Sekcio de la Libro konsistis el 330 verkoj; sekcio de Presado Turismo kaj Filatelio enhavis 38 eldonaĵojn el 15 landoj. Samtempe kun la Ekspozicio okazis en granda salono de la Biblioteko prelegoj pri Esperanto, ĝia movado kaj literaturo. Dum 45 tagoj, 31 ĵurnaloj eldonis 65 artikolojn pri la manifestacio, kaj la Radio dissendis 9 komunikaĵojn.

● **Prelegoj pri Esperanto en Leningrado.** La leningrada filio de la Tutunia Societo por Disvastigo de Politikaj kaj Sciencaj Scioj organizis dum februaro kaj marto ciklon de kvar prelegoj kun jenaj titoloj: Problemo de la internacia lingvo kaj ĝia historia evoluo; Fundamento de la internacia lingvo Esperanto; Internacia lingvo Esperanto en servo por la paco kaj interpopolaj kontaktoj; Nuntempa belarta kaj politika literaturo en la lingvo Esperanto. Prelegis Kandidato al filologiaj sciencoj N. D. Andrejev, Docento S. N. Podkaminer kaj verkisto J. V. Sergejev (Moskvo).

● **Esperanto en la gazetaro.** En pola ĉiutaga gazeto „Dziennik Łódzki” n-ro 311 1956 aperis artikolo pri Esperanto, montrante la disvolvon de la esperantomovado, la belecon de la lingvo, kaj menciante la faman verkiston d-ro K. Bein (Kabe), kun cito ankaŭ el „Sinjoro

Tadeo” (trad. Grabowski). „Łódzki Spółdzielca Pracy”, organo de Łódz Unuiĝo de Industriaj Kooperativoj, n-ro 12 1956, enhavis artikolon pri Esperanto kaj Kooperativa Movado. „Notkajero de la agitanto” (Bulgarujo) n-ro 4 enhavis artikolon „Esperanto — lingvo de amikeco inter la popoloj” de As. Grigorov. Tiu grava eldonaĵo aperas en 52,000 ekzempleroj. La 7a numero de „Cultura”, grava portugala revuo sub direkto de D-ro Frazão de Faria, enhavis 5-paĝan biografion de L. L. Zamenhof. En al 1-a numero aperis artikolo 2-paĝa pri Unesko kaj Esperanto, kaj en la 5a aperis 5-paĝa artikolo titolita „Esperanto?”. „Cultura” estas eldonata en 10,000 ekz. En „Republica”, taggazeto en Lisboa, Portugalujo, aperas rubriko „Cronica Esperantista”; la n-ro 9423 enhavis artikolon de Saldanha Carreira pri „Jan Amos Komensky”.

● **Novaj prospektoj en Esperanto.** Balkantourist, Sofio, ĵus eldonis plurpaĝan multilustritan prospekton tute en Esperanto pri **La monaĥejo Ivan Rilski**. Samon faris International Presse- & Billedtjeneste, Boks 136, Kopenhago, pri **Danlando: Kopenhago**. Belajn prospektojn kun aldonitaj klarigoj en Esperanto eldonis: **Kreuth** (Gemeindl. Verkehrsamt, Kreuth bei Tegernsee, Germanujo) kaj **Billige Danske Rundture** (havebla ĉe Charles V. Jensen, Skernvej 2, Aarhus, Danlando; dankleterojn sendu al D.S.B., reklameafdelingen, Sølvgade 40, Kopenhago K.). La lasta aperis laŭ instigo de Dana Esperanta Fervojista Asocio. Interesiĝantoj petu ekzemplerojn ĉe la donitaj adresoj!

● **Por vojaĝoj al kaj tra Germanujo** nepre postulu la „Fernfahrplan”. Tio estas malgranda sed tre enhavampleksa oficiala trajntabelaro de la Germana Fe-


deracia Fervojo. Vi bonege povos utiligi ĝin por la preparo kaj efektivigo de viaj vojaĝoj, ĉar ĝi enhavas 3-paĝan klarigan tekston en Esperanto pri la signoj, tarifoj, transporto de pakaĵo, ktp. Vi ricevos ĝin senpage en la vojaĝoficejoj de viaj landoj, aŭ se ne eble, postulu ĝin poŝtkarte de: Deutsche Bundesbahn, Oberbetriebsleitung West, Essen, Germanujo.

● **Bulgara lernolibro de ĝenerala lingvistiko donas ekzemplon el Esperanto.** Dum 1956 la plej granda bulgara eldonejo „Nardodna Prosveta” eldonis unuan kaj duan partojn de **Uvod v ezikoznaniето** (Enkonduko en la lingvistikon) tradukitajn el rusa lingvo. Sur p. 190 aperas noto, kiu komparas la esperantan verbon „prunti” kun ĝia bulgara ekvivalento.

● **Semajno de eŭropaj popolkostumoj.** En la malgranda urbeto Neustadt/Holstein (Germanujo) ĉiujare okazas en la fino de julio aŭ komenco de aŭgusto la tielnomata „Europäische Trachtenwoche” (Semajno de eŭropaj popolkostumoj). Tiuj semajnoj okazas sub la protekto de la ministroprezidanto de Schleswig-Holstein. Ilia celo estas servi al la eŭropa penso por paco kaj amikeco. Eksterlandaj samideanoj, kiuj interesiĝas partopreni la semajnojn, petu informojn en Esperanto, menciante ke s-ro Carstensen estas preta traduki la leteron (skribu: zu übersetzen durch Thomas Carstensen, Postfach 30, (24b) Ahrensböck). Adreso de la Semajnoj: Kuratorium Europäische Trachtenwoche, (24b) Neustadt/Holstein, Germanujo.

● **Koresponda kurso en Bulgarujo.** Por la unua fojo en Bulgarujo estas organizita koresponda kurso de Esperanto por komencantoj. Ĝin organizis komunuma, ne esperantista entrepreno.

Dalai Lamao estas Patrono de Budhanaj Esperantistoj



La 9-an de decembro 1956 la Dalai Lamao de Tibeto, la plej altranga budhana reganto, kune kun la Pancen Lamao, vizitis la templon Anand Vihara en Bombaĵo, kie la du moŝtojn bonvenigis (vidu supre) Bhikkhu Anurudda, la abato, kiu estas Prezidanto de Budhana Ligo Esperantista. Nia samideano proponis, ke la du Grandlamaoj transprenu la Honoran Plej Superan Patronecon super B.L.E., kaj ili volonte akceptis, akceptante samtempe specimenojn de budhisma literaturo en Esperanto.

„Graĵoj en Vento”

La Tutmondaj Interlernejaj Rondoj

(fonditaj en 1956)

La celo de „Graĵoj en Vento” (GEV) estas:

a) *krei reton de infanaj rondoj sur la tuta terglobo.*

Rondo estas aro de 12 klasoj aŭ grupoj. Ĉiu rondo eldonas 3-foje jare komunan gazeton kun verkoj de la gelernantoj (rondoj de infanoj 6–15-jaraj, rondoj de 15–20-jaraj junuloj). La verkoj estas:

tekstoj pri reala vivo en la hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, lando; pri kutimoj, ludoj, festoj, ĝojoj kaj malfeliĉoj; desegnaĵoj, bildoj, fotoj, prospektoj, sekigitaj floroj, k.t.p.

La formato de la folioj estas ĉiam 21 x 29,7 centimetroj. Ĉiu kunlaboranta klaso (grupo) sendas al rondestro po 20 ekzempleroj por ĉiu eldono de la gazeto.

b) *pruvi la taŭgecon de Esperanto por interrilatoj de tutmondaj gelernantoj.*

c) *enkonduki Esperanton en la lernejojn.*

d) *labori per la infanoj por la internacia kunlaboro.*

Por pligrandigi la 5 jam funkciajn rondojn, ni adresas nian alvokon al klasoj kaj grupoj de ĉiuj landoj, speciale de tiuj, kiuj malmulte estas reprezentataj en la rondoj:

Italujo, Hispanujo, Islando, Norvegujo, Finnlando, Usono, Kanado, Brazilo, Urugvajo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Japanujo, Hindujo, Ĉinujo, Vietnamo.

Informon sendas la Centra Oficejo en Svislando. Oni aldonu internacian respondkuponon. Financa kontribuo por helpi al plua disvastiĝo de la rondoj estas bonvena. Oni sendu ĝin per internacia poŝtmandato al nia poŝtĉekonta adreso: „Graĵoj en Vento”, Marcel Erbetta, IVa 9185, rue des Pins 66, Bienne, Suisse.

(U.E.A. varme rekomendas ĉiel helpi ĉi tiun iniciaton.)

La kurso, kvankam multekosta, atingis grandan sukceson; jam aliĝis pli ol 1,000 personoj, kaj per tio superis la atendojn de la organizantoj.

• Esperanto-Festo en Knittelfeld.

Okaze de la 70-jariĝo de Esperanto kaj inaŭguro de Zamenhof-strato en la grava stiria industri-urbo Knittelfeld, okazos tie Esperanto-Festo la 7an kaj 8an de septembro 1957. La programo enhavas krom stiria folkloro vespero festkunvenon, in-

aŭguran solenon kaj ekskurson. Eksterlandaj gesamideanoj estas kore invitataj al partopreno. Aniĝoj estu direktataj al Esperanto-Societo „Verda Stelo”, Knittelfeld, Landschach 4, Stirio, Aŭstrujo.

• **Violon-Koncerto** de la konata budapeŝta s-ano kaj artisto Joseph Biro, eksano de la budapeŝta filharmonia orkestro, estis aranĝita fine de februaro de la Delegitaro de Vienaj Esp.-Societoj.

• **Grava nova revuo en Esperanto!** Komencis aperadi la revuo „Nuntempa Bulgario”, eldonata de Bulgara Telegrafa Agentejo. Jam aperis du numeroj. Laŭ ekstera aspekto la revuo estas zorge preparita kaj tre plaĉa; ĝi havas la saman formaton kiel nia UEA-organo, estas presita sur bonkvalita papero, per klaraj diversspecaj litertipoj, kaj enhavas kliŝojn. Ĉiu numero estas en 32 paĝoj kaj en eldonnombro 5,000 ekzempleroj. Koncerne la enhavon, la leganto povas kun ĝojo konstati la trafan vojon, kiun la eldonejo elektis kaj per kiu ĝi certe atingos la korojn de la samideanoj. Antaŭ ĉio la eldonejo prezentas la revuon kiel kulturan. Krome, oni povas legi en la ĉefartikolo de la unua numero jenajn liniojn: „... Nia grava tasko estas ankaŭ la respegulo de la Esperanto-movado.” Do la esperantistoj povas sentime kaj kun profito por si mem gratuli la eldonejon kaj la redaktorojn de la revuo. Ĝi povas servi kiel modelo ankaŭ al aliaj landoj, kiuj opinias la reciprokan konigon de siaj kulturaj atingajoj kaj reprezentantoj grava kaj necesa tasko.

• **Kurso en katolika seminario.** En la katolika seminario en Vich (Barcelona) seminariano Alfred Lantacana gvidas Esperanto-kurson por 24 lernantoj, inter kiuj troviĝis du seminaiaj profesoroj. Ankaŭ Esperanto-klubon oni fondis tie sub la nomo Seminaria Esperanto-Fako.

• **Skolta kunveno de esperantistoj.** Ĉe la Jubilea Ĵamboreo en Sutton Coldfield, Anglujo, okazos kunveno de Skolta Esperantista Ligo la 10an de aŭgusto. Ĉiuj anoj kaj esperantistoj estos bonvenaj.

• **Aperos du novaj esperantaj poŝtmarkoj.** La hungara poŝto promesis aperigi du esperantajn poŝtmarkojn (60 filer-an kun verda stelo, kaj 1 forintan kun bildo de Zamenhof) okaze de la 70-jara datreveno de la unua esperanta lerno-libro. Estos ankaŭ unuataga koverto kaj speciala stampo. La koverton kun la du pm. oni mendu antaŭe, kun sendo de 4 resp.kuponoj, ĉe: Hungara E. Instituto Marton Lajos, Bors-u. 2., Budapeŝt XII.

• **Okazos esperantista tendaro en Bulgarujo.** En vilaĝo Borima, Trojana

regiono, estos organizita dum tiu ĉi somero esperantista tendaro en tri periodoj de po 14 tagoj, kun speciala alloga programo. La prezo por 14 tagoj estas 200 levoj. Multaj bulgaraj samideanoj pretas akcepti kaj porpagi eksterlandajn esperantistojn kontraŭ reciproka gastado. Pri plujaj detaloj kaj interkonsento skribu al: Esperantista tendaro, Poŝtkesto 44, Sofio, Bulgarujo.



La Lingva Ĥaoso

La angla por la angloj . . .

Laŭ raporto en „News Chronicle”, Londono, s-ro Foden, instruisto en grava angla Tehnika Kolegio, skribas ke miloj da studentoj en teknikaj kolegioj malsukcesas pri siaj ekzamenoj — ĉar ili ne kapablas literumi simplajn anglajn vortojn. Kiel ekzemplon, li citas la ordinaran anglan vorton *bicycle*, kiun studentoj literumis laŭ 23 malĝustaj manieroj, ekz-e: bisicle, bicicle, bisikal, bicale, bicsicol, byclee, bicidy.

Se eĉ la angloj ne kapablas regi la anglan, nu . . .

. . . kaj por alilandanoj . . .

„Unu el la ĉefaj malhelpoj kontraŭ iu ajn formo de internacia kunlaboro estas ĉiam la malfacilo, persvadi reprezentantojn de la partoprenantaj nacioj, ke ili parolu la lingvon de la alia homo ĉe la konferencoj kaj komitatoj, sen kio estas neeble multe progresi. Precipe, neracia antaŭjuĝo jam longe ekzistas ĉe kelkaj alilandanoj, kiuj ne komprenas, ke ili devus paroli la anglan en tiaj okazoj.” (The Glasgow Herald.)

Eble estas konsilinde klarigi, ke la verkinto de la supraj linioj ne intencis, ke oni prenu ilin tute serioze. Kaj tamen . . .

Jen via lingvo, samideano

„Esperanto eble ne estas tiel peza kiel Volapük . . . Sed ĝia prononcado ne estas facila, kaj kelkaj el ĝiaj vortoj estas groteske formitaj . . . Kritikantoj de internaciaj lingvoj foje pretendas, ke eĉ se unu lingvo estus vaste akceptita, malsameco de akcento kaj paroltono mem eble kaŭzus post kelka tempo, ke ĝi evoluus laŭ diversaj tendencoj en diversaj landoj; kaj eĉ la skribita formo estus verŝajne influita delokaj idiotismoj kaj parolkutimoj. Ĉiuokaze, eĉ se oni pretendus praktikan utilon de artefaritaj lingvoj, tion nepre kontraŭpezus perdo de iaj kvalitoj de fleksebleco, riĉeco kaj precizeco, kiuj estas absolute necesaj por, ekzemple, internaciaj intertraktoj.” (El „The Oxford Junior Encyclopaedia”, eld. 1951.)

Jen vi havas — malgraŭ la fakto, ke Esperanto estas pruveble multe pli fleksebla, ĝenerala pli preciza, kaj preskaŭ certe ne malpli riĉa ol ekzemple la angla lingvo, en kiu la supra majstraĵo originale aperis . . . por jam ne paroli pri „groteske” formitaj vortoj . . .

La Kongreso de la mediteraneo

MARSEILLE

Brila programo

Brila suno

Aliĝu tuj!

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas; unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

Bedaŭrinde, en nia marta numero erare ne estis metitaj steletoj kiuj indikas riceveblecon ĉe U.E.A. Ni atentigas, ke ĉiuj kvar libroj recenzitaj en tiu numero, estas aĉeteblaj ĉe U.E.A., nome: *LA INFANA RASO, TEATRO EN SOCIETO, GRUK* kaj *SUSPEKTINDA PERSONO*.

KAGUJAHIME KAJ ALIA. Japanaj popolrakontoj. Eld. Esperanta Virina Asocio, Osaka, 1956. 16 p. 12.5 x 18. Prezo: 2 ekz. kontraŭ 3 rpk.

Samideaninoj Satori Kita kaj Hirokazu Kaji verkis du popolrakontojn kaj Kazuko Katajama faris la kvar bildetojn. Tiu ĉi libreto estas ŝajne la unua en projektita serio.

En la unua rakonto mi rimarkis gramatike dubsencan „ĝi”, kaj uzon unufoje de „ĉu” kie „eble” estus pli normala. En la dua la uzo de „efektiva” ŝajnas almenaŭ al mi iom netaŭga kaj la vorto „cipreo” bezonas gloson; sed alie la du rakontoj estas en multe pli bona stilo ol kelkaj enhave valoraj libroj kiuj antaŭe venis el Japanujo. Jen du iom melankoliaj, sufiĉe plaĉaj popolrakontoj, rera-kontitaj por ni Esperantistoj per taŭge simpla, preskaŭ naŭva stilo. Por mi ili iomete odoras je la floroj kiujn la japaninoj tre amas...

Marjorie Boulton

LUDILOJ: DUA ABC-LIBROJ.^{*} Strofoj de Nenjo Rimanto, kun bildoj de Brian Leslie. Eld. British Esperanto Association, Londono. 14 p. 12.3 x 18.3. Prezo: 0.60 gld. (2.40 steloj).

Dua volumo de ilustritaj versaĵoj celantaj la plej junan tavolon de la denaskaj, aŭ preskaŭ denaskaj, esperantistoj. Jen specimeno:

A por arkeo,
etulojn ĝi ravas.
Ludilajn hometojn
kaj bestojn ĝi havas.

MORFOLOGIA ATLASO DE HOMA DENTARO de Zoran Mušič. Trad. Peter Zlatnar. Eld. Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana 1956. 10 p. da teksto plus 27 p. da ilustraĵo. 22 x 29. Prezo: 300 din. (15 steloj).

Debuto de Esperanto sur malofta kampo, kaj bona pruvo pri la utileco de la Internacia Lingvo en sciencaj fakoj. Ne nur ĉiuj dentistoj deziros posedi tiun ĉi verkon, sed ankaŭ ĉiuj propagandistoj

de nia lingvo aĉetos ĝin por sia varbado kaj ekspozicioj.

VARSOVIO.^{*} redaktis Dobrosław Kobielski. Eld. Varsovio 1956. 48 p. 21.5 x 23.5. Ricevebla, kontraŭ libroj, gazetoj, insignoj kaj diversaj esperantaĵoj, ĉe Asocio de Esperantistoj en Pollando, ul. Kozia 3, Varsovio, Pollando. Prezo: 2 gld. (8 steloj).

Kiu jam vidis la belegajn eldonaĵojn aperintajn en Pollando dum la pasintaj monatoj, tiu ne hezitos akiri al si ankaŭ tiun ĉi interesan albumon pri Varsovio, ĉefurbo en kiu „dum periodo de militjaroj 80 % de ĉiuj konstruaĵoj... estis ebenigitaj kun la tero”, kaj kiun oni jam grandparte rekonstruis.

KATALOGO DE ESPERANTAJ GLUMARKOJ, ĉapitroj I-IV: Internaciaj kaj Landaj Kongresoj. Eld. Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo. 25 p., multobligite. 15 x 21. Prezo: por Membroj de la Muzeo, 6 resp. kup., por ne-Membroj, 8 resp. kup. Mendu ĉe la eldoninto.

Tiu ĉi katalogo, kompilita de s-ro Georges Saget, posedanto de unu el la plej kompletaj kolektoj de esperantaj glumarkoj, estos treege bonvena al niaj kolektemuloj — kiuj, cetere, faras bonan laboron, registrante facile perdeblajn esperantaĵojn. Antaŭ la Dua Mondmilito D-ro Tákcacs, Hungarujo, eldonis tian katalogon, sed ĝi ne nur malaktualiĝis, ĝi ankaŭ ne plu estas havebla. Tiom pli grava estas la laboro de s-ro Saget. Ni atendas kun scivolo la daŭrigon de la katalogo per alia ĉapitro pri glumarkoj de foiroj, ekspozicioj, k.s.

NIA LINGVO ESPERANTO^{*} de Karl Vanselow. Eld. Druck-Universal, Berlin, Germanujo. 6 libretoj po 32 p. 10.5 x 14.5. Prezo: po 0,50 gld. (2 steloj).

Tiuj ĉi libretoj, kiuj enhavas sume 250 poemojn kaj kantojn, estas bone konataj de la esperantistaro. Ni notas kun ĝojo, ke ili atingis sian duan eldonon, kaj ni rekomendas ilin. Ĉiu esperantisto volonte havigos al si la tutan serion.

TAJPADO, teorio kaj praktiko, de A. G. Provost. 34 p., multobligite. 21 x 27.5. Prezo: 150 fr. fr. (5 resp. kup.). Havebla ĉe: A. G. Provost, 15 rue Lesage, Paris XX, Francujo.

Por novicaj tajpistoj esperantistaj, tiu ĉi libreto estas nepre havinda; sed eĉ iom pli spertaj tajpistoj trovos ĝin interesa, kaj tre versaĵne ekscios kelkajn detalojn, kiuj ebligas plirapidigon de ilia tajpado.

ESPERANTOLOGIO.^{*} Unua Volumo. Red. Ak. D-ro Paul Neergaard. Eld. Munksgaard, Kopenhago, 1949—1955. 256 p. en 4 kajeroj. 18 x 26.5. Prezo: 25 angl. ŝil. (50 steloj). Havebla ĉe: D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K., Danujo.

Tiuj esperantistoj, kiuj ne abonis la revuon *ESPERANTOLOGIO*, kiam ĝi aperis, povas nun ŝtopi tiun truon sur iliaj bretoj per aĉeto de la unua volumo. Ĉiuj povas proponi la aĉeton de la volumo al publikaj bibliotekoj. Ĉiu serioza esperantisto devus ĝin posedi, ĉar ĝi enhavas multan materialon pri la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto, kiun oni devus koni kaj ne trovos aliloke. Jen nur kvar artikoloj gravaj kaj utilaj: *La akuzativo en Esperanto, el teoria kaj interlingvistika vidpunkto* (Waringhien); *Statistiko de 50.000 tekstvortoj* (Blaas); *La Zamenhoŝa Hamlet-traduko* (Setälä); *La terminoj „esperantologio” kaj „interlingvistiko”* (Wüster).

SCIO-BELO-LINGVO, Unua Volumo. Eld. Workers' Esperanto Movement, Londono, 1955. 36 p., multobligite. 20.5 x 32.5. Prezo: 2 ŝil. (4 steloj).

La britaj laboristaj esperantistoj havis la bonegan ideon eldoni kolekton de prelegoj kaj literaturaĵoj por utiligo dum grup-kunvenoj. En tiu ĉi unua volumo troviĝas verkoj de Wajsblum, Auld, Mildwulf, Capp, Flugel kaj Prent — nomoj, kiuj garantias la altan kvaliton de la enhavo. Kvankam la eldono estas multobligita, tiu fakto malhelpu neniun aĉeti la interesan kajeron; ju pli baldaŭ disvendiĝos la 1-a volumo, des pli baldaŭ aperos la 2-a.

ESPERANTO FROM BJELOSTOK TO MONTEVIDEO^{*} de Ald. Richard Bland, D.B.E.A. Kolektitaj artikoloj el „Nelson Leader”. Prezo: 6 p. (1 stelo) plus aŭfranko, de: R. Bland, 180 Hallam Road, Nelson, Lancs., Britujo.

Tiu ĉi malgranda libreto estas eble la plej taŭga propagandilo nuntempe havebla en angla lingvo. En serio da ĉapitroj la aŭtoro pritraktas la evoluon de la Internacia Lingvo de 1887 ĝis hodiaŭ, kaj sukcesas doni tre kompletan impreson pri la atingoj de Esperanto sur la plej diversaj kampoj. Senhezite rekomendinda.

KIE ESTAS LA MORTINTOJ? La respondo de la Biblio, de J. F. Rutherford. Eld. Internacia Asocio de Biblio-Studentoj Garda Turo, Biblio- & Traktat-Societo, Brooklyn, N.Y., Usono. (Esperanto-ŝako: Baden, Svisujo). 55 p. 12 x 18. Prezo ne montrita.



OFICIALA KOMUNIKO

n-ro 7

aprilo 1957

Novaj kotizoj: Ek de la 1-a de aprilo validas jenaj kotizoj: kongresano: 3.000 fr., edzino de kongresano 1.500 fr., junu(in)o ĝis 20 jaroj kaj studentoj: 1.000 fr. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton de 400 fr.; edzino de kongresano 200 fr.

Novaj kunvenoj: Anoncis fakkunvenon:
— Internacia Scienca Asocio Esperantista, ĉe Prof. B. Popović, Zagrebčka 18, Sarajevo, Jugoslavio.
— Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, d-ro F. Szilagyi, 3 Villag 26, Borås, Svedujo.
— Internacia Fervojista Esperantista Asocio, 11 rue de Milan, Paris 9, Francujo.
— Internacia Geografia Asocio, s-ro Tibor Sekelj (vojaĝas), ĉe UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

Anoncis fondkunvenon:

— Verkista Asocio, d-ro F. Szilagyi, 3 Villag 26, Borås, Svedujo.

Faka vizito: por fervojistoj estas antaŭvidita vizito al la Ponto de Carente, interesa artkonstruaĵo, 50 km. de Marseille. Interesatoj anoncu sin.

Kongresa libro: Ĝi estos sendata al ĉiu kongresano fine de junio. Por publikigi en ĝi anoncojn, bonvolu kontakti kun la kongresa kontoro.

Reklamiloj: Faldfolioj en Esperanto povos esti liverataj al la kongresanoj kune kun la Kongresa Libro. Petu la kondiĉojn al la kongresa kontoro.

Gazetara servo: La esperantistoj, kiuj informos la kongresan kontoron pri aperigo de artikoloj aŭ informoj pri la Universala Kongreso en sialanda gazetaro (escepte de Francujo), rice-

42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957

Francujo.

Adreso: 32, Cours d'Estienne d'Orves, Marseille, Francujo.

Telefonoj: PRado 55-46; FErréol 96-18. Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa, Marseille.

Ĝirkonto: Groupe Esperantiste — Marseille n-ro 156-15.

Sub la protektado de S-ro René COTY, prezidanto de la Franca Respubliko

vos omaĝe broŝurojn en Esperanto.

Invito al la registaroj: La Loka Kongresa Komitato invitis ĉiujn registarojn, membrojn de UNESKO, sendi reprezentanton ĉe la Universala Kongreso.

Gazetara Konferenco: Gazetara Konferenco por la landa kaj eksterlanda gazetaro okazis en Parizo.

Infana Kongreseto: La Loka Kongresa Komitato rekomendas al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj parolas Esperanton, la partoprenon en la 2-a Internacia Infan-Kongreseto, kiu dumtage pensione zorgos kaj distros ilin. L.K.K. petis al UNESKO sendi observanton ĉe la aranĝo. Aliĝo al la U.K. estas senpaga ĝis 13 jaroj.

Lasta limdato: Post la 30-a de junio plu ne estos akceptitaj aliĝiloj. En la kongresejo ne ekzistos tagaj kartoj. L.K.K. atentigas la prokrastemajn esperantistojn pri la neceso tuj aliĝi al la Universala Kongreso.

Statistiko (ĝis fino de marto): Alĝerio 3, Aŭstrujo 21, Aŭstralio 1, Belgujo 11, Brazilo 3, Britujo 67, Bulgarujo 17, Ĉeĥoslovakio 5, Danlando 20, Finnlando 10, Francujo 330, Germanujo 76, Hispanujo 20, Grekujo 1, Italujo 103, Izraelo 1, Jugoslavio 34, Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko 11, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 38, Norvegujo 6, Novzelando 2, Pollando 7, Portugalujo 5, Sudafriko 2, Svisujo 19, Svedujo 39, Turkujo 2, Usono 5, Venezuelo 1. Entute 869 el 33 landoj.

Lastmomento: Jam 1.000 aliĝintoj komence de aprilo!

Gian Carlo Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por ondlongoj kaj horoj de la dissendoj, vidu la aprilan nron p. 72

Radio Roma. 3-V, Ridetas Majo; 7-V, „Granda Paradizo”, somera libertempejo esperantista; 10-V, Leterkesto kaj bibliografio; 14-V, Religia kaj socia misio de Skta Katerino el Sienn; 17-V, Tago de Bonvolo; 21-V, Novaĵoj el Italujo; 24-V, Ialtujo kaj fremdaj verkistoj; Victor Hugo; 28-V, Ovidius Naso; 31-V, Someraj restadejoj en Italujo; krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto.

Niaj Konkursoj

Literatura Vetludo N-ro 5

A. Verku poemon adresitan al mond-diplomatoj aŭ al regnestroj, en formo de rondelo, soneto, dektrio (dek tri tercinversonoj) aŭ balado.

B. Prozemuloj estas invitataj verki du telegramojn al diversaj mondfamaj personoj. La komencliteroj de ĉiu telegramo devas elliteri la nomon de la adresato.

Ni difinas apartajn premiojn por A. kaj B. en formo de libropremioj kun enskribo. Konkursaĵoj atingu la redakcion ĝis la 30-a de junio. Pseŭdonimo laŭvole (sed aldoni sian ĝustan nomon kaj adreson).

John Varty

Literatura Vetludo I

Raporto de John Varty

Mi invitis niajn poetojn resumi per utao iun originalan poemon aŭ novelon aŭ romanon. La du lastajn kategoriojn neniu atakis, mi ankaŭ ne tre atendis tion. Venis sume 9 konkursaj utaoj de ses aŭtoroj: per tio modeste debutas nia nova rubriko. Krom tio 3 aŭtoroj, iom miskompreninte la instrukcion, sendis utaojn laŭ originalaj temoj; mi sekve devis elimini ilin. Mi tamen ne povas ignori la 12 utaojn de B. Losada, Venezuelo, ĉar ili signas embrian poeton kun neordinara penspotenco. (Eble nia redaktoro trovos anguleton por kelkaj?) Amiko Losada sin metu sub varton de kompetenta poeto, kaj mi ne dubas, ke post du jaroj li forte disradios sur nia firmamento.

La atakataj poetoj estis Zamenhof, Devjatnin, Kalocsay, Ragnarsson, Auld. Min surprizis la mankoj, precipe Baghy. Kelkaj vetludanoj kulpis, reuzante rimojn el la originalo. Aliaj ne atentis, ke utao pri poemo devas ankaŭ esti poemo.

Mi rekomendas ĉifoje nur du premiojn: libron elektotan en valoro de 10 guldenoj por J. C. Wells (Burton-on-Trent, Anglujo) pro lia provo, kiu lerte kaptis la tonon de Kalocsay; kaj libron en valoro de 5 guld. por Poul Thorsen, kies utao atingis plenan rimiĝon je ioma kosto de logika sekvo.

Kalocsay: Mortis Grabowski

La verda muzo
mutu en trista ploro:
Grabowski mortis,
Li sciis majstre verki:
verku al lia gloro!

J. C. Wells

William Auld: La infana raso XXIII

Fekunda ĝermo
en kerno de tritiko
fariĝos spermo,
faruno, pano, spiko
aŭ — ekskrementa briko.

Poul Thorsen

La Ĝenerala Mondekspozicio en Bruselo 1958

Kiam je 3 Aprilo 1958 la Mondekspozicio estos malfermata, komenciĝos ne nur vastega kaj interese ekspozicio, sed ankaŭ periodo de riĉa kaj varia kultura, art-, kaj literaturagado. Dum 7 monatoj tiu ekspozicio estos honorigo al la homo en ĝia kompleto, speciale al ĝia krea genio. Tial ĝi okazos sub signo ne de la tekniko aŭ de la materio sed sub signo de la humanismo. Oni prilumos tie ankaŭ la spiritajn akiraĵojn de la homo kaj ĝiajn intelektajn laborojn. Estas pro tio ke okazos multaj kongresoj. Celo estas: pliproksimigi kaj daŭre interrilatigi intelektajn esploristojn de la tuta mondo. Dum la ekspozicio ili povos komuniki unu al la aliaj siajn provojn, rezultatojn, rimarkojn, sugestojn ktp. Se ni povas tiel diri, la ekspozicio havos temon, nome: la homo en la mondo de hodiaŭ kaj de morgaŭ. Kaj pro tio la estraro de la ekspozicio petas ke absolute ĉiuj kongresoj okupiĝu dum almenaŭ unu kunveno pri specife homaj problemoj kaj ke ili verku raporton pri tio. Ĉiuj tiuj studoj estos en ĝenerala raporto kunigataj kaj formos ampleksan dokumenton. Tiel la estraro eĉ esperas helpi al renovigo kaj plibonigo de la mondo kaj de la homaro. Inter la plej elstaraj manifestacioj estos du artekspozicioj. Ĉiuj muzeoj de la mondo estas petataj partopreni. Unua ekspozicio montros la arton de la prahistorio ĝis nun. Dua: la nuna arto ĉie en la mondo. Estus tro detale priskribi tie-ĉi la eksterordinarajn standojn kiujn prezentos ĉiuj partoprenantaj nacioj. Ekz. en la kadro de Belgujo estos starigata la „palaco de la eleganteco”. Tie okazos la solenaĵoj kaj en angulo de ĝi estos la pavilono de la diamantoj kaj tiu de la luksaĵoj. Sennombraj estos la belegajoj tie kaj la tuto prezentos neimageblan belon.

Por atingi supremecitan celon, la estraro disponigos multajn salonojn kiel ekz. palacon IX (2.500 lokoj). Estos aparatoj kiuj ebligas samtempan tradukon en multaj lingvoj. Esperanto ne ankoraŭ estas sufiĉe uzata kaj tial tiuj grandegaj kostoj kaj komplikaj kaj malperfektaĵoj estas neeviteblaj. La estraro zorgas ankaŭ pri loĝado. Jam enskribiĝis multaj civitanoj kiuj volas lui unu ĉambron. Estas konstruata sub la nomo „Expo-Motel 1958” la urbeto kun 2.000 ĉambroj po du litoj; poŝtoŝtelo, telefonoj, Ruĝa Kruco ktp. Estos ankaŭ tereno por tendumi. La estraro volas ankaŭ ke la tuta lando preparu sin por akcepti la gastojn en '58. Tial ĝi instigas la popolon por lerni fremdajn lingvojn per kursoj. Ĝi ankaŭ faras kampanjon por ĝentileco flanke de ĉiuj oficistoj. Kaj, fine, la tuta lando devos havi belan aspekton. Ĉiuj publikaj konstruaĵoj kaj vojoj estos ornamitaj per floroj.

Rilate la lernadon de fremdaj lingvoj, la estraro ne diras kiom da lingvoj nek kiujn la Flandroj kaj la Valonoj devos lerni. Ĝi evidente volas ke la tuta nacio havu rektan rilaton kun la fremdaj vizitantoj. Sed kiom da diversnaciecoj venos? Konsiderinda nombro, certe. Kiom da studohoroj necesos por ke oni povu iom babili pri nur ĝentilaĵoj? Ni ne parolas pri la vera kontakto kiu estas pli intima. Tiujn realaĵojn la estraro ne sufiĉe pripensas aŭ ne trovas solvon por ili. Esperinde, la esperantistaro grand-nombre skribos al la direktoraro en nia lingvo por peti informojn ktp. Ja, la direktoraro havas intereson pri Esperanto; nur ne scias ĉu jam multe utilas. Iamaniere la Esperanto-movado devus pruvi la kulturen valoron de Esperanto per ia manifestacio, ĉu somera universitato? ĉu per kongreso? Adreso de la Mondekspozicio: Putterij 28, Brussel.

Drs. Fernand Roose, Brugge

NIA FORUMO

„Ankoraŭ unu alian! . . .

Mi tute ne intencis plagiati literaturan titolon el „La Nica Revuo”. Temas eĉ ne pri literaturo, sed pri — stratoj. Tiuj, kun esperantaj nomoj. En la januara n-ro de „Esperanto” mi vidis liston kun nomoj de urboj en kiuj troviĝas tiaj stratoj. Mankas okcidentgermana urbo Hanovero, la metropolo de la liglando Malsupra Saksio. En ĝia nova urboparto, proksime al la foirejo de fama tutgermana Hanovera Industri-Foiro, oni alnomis antaŭ kelkaj jaroj novan strateton laŭ la Internacia Lingvo.

En la supre-menciita listo troviĝas Esperanto-Vojo en Radstätter Tauern en Aŭstrio. Preskaŭ eksterdube temas pri tute privata vojeto, kondukanta de publika ŝoseo al unu privata alphotelo („Felseralm”). Ĉu ĝi ankoraŭ entute portas lignan ŝildon, kiun proprainiciate (kun la permeso de la posedanto) faris

ni, kelkaj anoj el la Esperanta Grupo de la „Internacia Kampara Junularhelpo 1954 — Salzburgo”, estas demando. Ĉiuokaze, laŭ mi, tiu „strato” povas libere forfali el la listo, lasante lokon al „veraj” (publikaj) Esperanto-Stratoj. Marĝene, Esperanto-strato en jugoslavio urbo Zagrebo portas nomon de d-ro L. L. Zamenhof, kio ne estas vidbla el la listo.

Ivica Šponar, stud., Zagrebo.

La Universalaj Ekpozicioj.

En la marta numero de nia revuo Esperanto mi je mia granda surprizo legas ke „Krome, dum la okazigitaj ekspozicioj multe da materialo perdiĝis”.

Kune kun aliaj klubanoj el Bergen mi estas inter tiuj kiuj kontribuis por la fondaĵo ekspozicia, kaj mi tial volonte deziras scii, kiel la koncerna materialo perdiĝis, kaj kiom valora estis tiu kvanto kiu jam perdiĝis. Mi esperas ricevi respondon de la respondecaj personoj.

Elna Matland, Bergen

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 293

La 1-an de aprilo 1957.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de marto kaj ankaŭ por komparo, je la fino de marto 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	6658	4862
Individuaj membroj		
MJ	681	627
MA	3535	4510
MS	639	584
Pat.	9	5
DM	290	301
HM	54	52
JMJ	—	6
JMA	—	75
	5208	6160
	11866	11022

DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires FD (Universala Religio): s-ro Andres Villafranca, vitralisto, Méjico 2884. Tel. 97-7544.

Aŭstrujo

St. Veit a/Triesting D: S-ino Antonia Tempus-Listner, pensiita instruistino, Fabrikstrasse 20.

Britujo

Abergavenny (Monmouthshire) D: S-ro F. C. Allen, kemiisto, Nia Domo”, Holywell Crescent. Tel. Pontypool 420 (int. 9 h—17.30 h).

Manchester (Lancashire) FD (Arto: grafiko): S-ro John Hartley, teknika desegnisto, 41, Linden Road.

Bulgarujo

Pazarĝik VD: S-ro Vasilev Ivan Kostantinov, metiisto, ulica Batak 26.
Selo Beglej (Plevensko) D: S-ro Stojan Ivanov Ĵelezarov, koopera oficisto, Terkultura Mastruma Kooperativo, TKZS, FD (Komerco): S-ro Ĥristo Cvetkov Mladenov, piroteknikisto, Dondukov 4. Tel. 36-34.
Sofija IV FD (Biologio): S-ro Vasil Bozarov, universitata instruisto, str. Svetoslav Terter 4. Tel. 4-14-28.
Varna D: S-ro Georgi Dimov Ĥr, universitata lektoro, str. Makedonia 102, Tel. 29-98.
VD: S-ro Dimitar Dimov K, advokato, str. General Parensov 35. Tel. 49-66.

Ĉeĥoslovakujo

Hradec Králové (Ĉeĥy) FD (Bibliotekoj): S-ro Zdenek Hršel, biblioteka teknikisto, Na Špici 103. Tel. 5447.
Kralupy nad Vltavou (Ĉeĥy) D: S-ro Antonín Tešik, oficisto, V. ruzovém údolí 200.
Netolice (buhy). D: S-ro Stanislav Stepánek, oficisto, Bavorovská ul. 48. Tel. 802.
Perštejn n/O (Ĉeĥy) D: S-ro Jan Kafka, mineja inspektisto.
Razová (Morava-Sleszsko) D: S-ro Josef Parizek, direktoro de mezlernejo, okr. Bruntál. Tel. 6.

Danlando

Engesvang (Jylland) D: Vakas.
FD (Fervojoj): Vakas.
Helsingør (Sjaelland) D: S-ro Ejnar Langkilde Rasmussen, instruisto, Inge-mannsvej 18, Tel. 212546.
Tønder (Jylland) D: S-ro Ernst Mertner, trafikekspedisto, Østergade 57.
FD (Fervojoj): La D.

Finnlando

Helsinki (Centra) VD: Vakas.
Helsinki-Vartiokylä VD: S-ro J. N. Mikola, Kiviportintie 96. Tel. 731319.

Francujo

Bourges (Cher) D: S-ro Louis Carré, inĝeniero, 31, rue Bourbonnoux. Tel. 10.89.
Cormeilles-en-Parisis (Seine et Oise) FD (Fervojoj): F-ino Yvonne Dérue, fervojistino, 7, rue de la Côte Saint-Rémy.
Gray (Haute Saône) D: Vakas.
Ivry s/Seine (Seine) D: Vakas.
FD (Numismatiko): Vakas.
Laroche (Yvonne) JD: F-ino Marie-Alice Malraux, studentino, l'Ermitage.
Loctudy (Finistère) D: F-ino Lucienne Durand-Berthauld, fervojistino, route de la Plage.
Montreuil (Seine) FD (Edukado): S-ro Maurice Rétot, instruisto, 162 Boulevard Aristide Briand.
Paris 20 FD (Stenografio): S-ro Gaston Provost, oficisto, 15, rue Lesage.
Reims (Marne) FD (Fervojoj): F-ino N. Pariat, oficistino, 6, rue Caqué, Tel. 42.38.
Saint-Die (Vosges) D: Vakas.
Strasbourg (Bas Rhin) FD (Juro): S-ro Alfred Schwing, kontekspertizisto, 10a, rue du 22 Novembre. Tel. 32.09.58.

Germanujo

Aalen (Württ.) D: S-ro Franz Kreipl, eksurbnispektoro, Untere Bahnstr. 11.
Darmstadt-Eberstadt (Hessen): D: S-ro Erich Zimmerschitt, studento, Heidelberger Landstrasse 182.
Heide (Ditmarschen) JD: S-ro Arthur Schröder, ĉizisto, Waldschlösschenstr. 35.
Ibbenbüren (Westfalen) D: S-ro Richard Glasow, instruisto, Alte Bockradener Str. 196.
Mannheim (Baden-Württ.) JD: S-ro Johannes Radam, Osteroderweg 4.
München (Oberbayern) FD (Pax Christimovado): S-ro M. M. Mielert, emerita gimnazia ĉefinstruisto, Wurzerstrasse 18 III.
Radebeul apud Dresden (Sachsen DDR) D: S-ro Walter Ranft, komerca dungito, Freiligrathstr. 4.
Recklinghausen (Nordrheinwestfalen) FD (Instruado): S-ro Alexander Dreger, ekspopollernejestro, Halterner Str. 330.
Tailfingen (Württ.) JD: S-ro Eugen Conzelmann, pentristo, Juliusstr. 22.
Walsdorf-Taunus (Hessen) JD: S-ro Werner Hohl, tornisto, Hintergasse 136

Hispanujo

Las Palmas (Kanariaj Insuloj) FD (Turismo): S-ro Felipe Suárez-Falcón, komercisto, strato Triana 16. Tel. 7388.
JD: S-ro Oscar Yanez Miranda, studento, Leon y Castillo 44. Tel. 5-8-1-8.
Valencia FD (Hoteloj): Vakas.
FD (Filatelo): S-ro J. Ernesto Guillem, librotenisto, Marqués de Caro 6, 2-a. Tel. 54618.

Italujo

Aosta D: D-ro Anselmo Falcoz, oficestro, via al Gran S. Bernardo 13. Tel. 62-26.
Carbonia (Sardinio) D: S-ro Gavino Nurra, via Oristano 14. Tel. 62.21.
Firenze JD: s-ro Eugenio Cini, studento, via G. Bande Nere 19. Tel. 670757.
Milano FD (Fervojoj): S-ro Giuseppe Quarone, eksfervojisto, Viale Col di Lana 4. Tel. 855.877.
Roma FD (Katolikismo): S-ro Miklos Boglárý, sacerdoto, Piazza S. Marcello 5. Tel. 689.995.
Verona JD: S-ro Gino Rossi, komercisto, Via S. Nazzaro 1. Tel. 2.23.82.

Nederlando

Amsterdam FD (Statistiko): S-ro B. C. Sliggers, statistikisto, Lord Kelvinstraat 15 II.

Norvegujo

Hasvik D: Vakas.
Mo i Rana (Nordland) D: S-ro Leif Øines, fervojisto, Skolegt. 8, Tel. 326.

Novzelando

Christchurch FD (P.T.T.): Vakas.

Pollando

Stargard Szcz. (Woj. Szczecinskie) D: S-ro Edward Dembski, instruisto pri latino lingvo, ul. Belojannisa 7 m. 2. Tel. (de liceo) 914.
FD (literaturo): La D.
Zielona Góra D: S-ro Stanislaw Rams, ĵurnalisto, ul. Zyty III m. 22.

Portugalujo

Leiria (Beira Litoral) D: S-ro Alfredo Lúcio de Sales, bankoficisto, Olhalvas.
Moscavide (Estremadura) FD (Bestprotektado): S-ro Jorge Teixeira, radioteknikisto en aviado, Praceta do Estado da Índia 4-3º Esq.
Viseu (Beira Alta) FD (Pediatrio): D-ro Augusto César Anjo, kuracisto, Largo António José Pereira. Tel. 2136.

Rumanujo

Bukuresti D: S-ino Ghizela Harabagiu, oficistino, Str. Nikos Beloiannis 1, et. II, apt. 6. Tel. 5-35-73.

Svedujo

Ystad (Skåne) FD (Elektro-komerco): Vakas.
FD (Bankaj Aferoj): S-ro Malte Haraldson, bankestro, Hamngatan 6. Tel. 13419.

Svislando

Chur (Graubunden/Grizono) FD (transporto): S-ro Edwin Thomas, komercisto, Harbertstrasse 20. Tel. (oficejo) 081.21015.

Turkujo

Istanbul VD: S-ro İbrahim Semetey, doganoficisto, 11 No.lu Antrepo Gümrük Kontrol Memuru, Resadiye Caddesi, Eminönü.

Urugvajo

Montevideo FD (Kemio): S-ro Alberto Barrocas, kemistudento, Yaguari 2248, ap. 3.
FD (Edukado): S-ro Manuel Fernández Menéndez, edukisto, Calle 21 de Setiembre 2405, p. 1º. Tel. 41 09 04.
FD (Studentaj Aferoj): S-ro Nicolás Grab, jura studento, Camino Maldonado 7024.
Tala (Canelones) FD (Kokinbredado): S-ro Wágner Hirigoyén, ŝtatoficisto.

Usono

Fayetteville (Arkansas) D: S-ro Georg Iggers, profesoro, 195, W. Lafayette St. Tel. Hillcrest 2-4388.
San Francisco (Calif.) FD (Liberpensado): S-ro C. Thomas Irwin, studento, 1201 Gough St.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

- 276 Schuster, s-ro Oberkirchenrat E. L., Wiesbaden, Germanujo.
- 277 Stoffers, s-ro Robert, Bremerhaven-Speckenbüttel, Germanujo.
- 278 Abascal Fernández, s-ro Francisco, Sevilla, Hispanujo.
- 279 Fernandez Méndez, s-ro Manuel, El Ferrol del Caudillo, Hispanujo.
- 280 Lopez Rodríguez, s-ro Manuel, Barcelona, Hispanujo.
- 281 Martin Arroyo, s-ro Julián, Oviedo, Hispanujo.
- 282 Roberto Vivas, d-ro José, Santa Cruz de Tenerife, Hispanujo.
- 283 Solá, s-ro M., Tarrasa, Hispanujo.
- 284 Costantini, s-ro L., Milano, Italujo.
- 285 Lacalendola, prof. Adamo, Bari, Italujo.
- 286 Muretti, d-ro inĝ. Mario, Torino, Italujo.

- 287 Sgroi, s-ro Rosario, Catania, Italujo.
 288 Viti, s-ro Giulio, Messina, Italujo.
 289 Giunio, s-ro Petro, Zagreb, Jugoslavujo.
 290 Janjić, d-ro Fran, Zagreb, Jugoslavujo.
 291 Forgeau, s-ro Jean, Montreal, Kanado.
 292 Symoens, s-ro E., Leopoldstad, Belga-Kongo.
 293 Apcher, s-ino G., Meknès, Maroko.
 294 Bat, s-ro, Meknès, Maroko.
 295 Bideau, s-ro Antoine, Rabat, Maroko.
 296 Cazaudarré, s-ro Fernand, Sidi-Yahia-du-Rharb, Maroko.
 297 Gomez, f-ino Angèle, Meknès, Maroko.
 298 Blijmolt-Ochtman, s-ino C., Amsterdam, Nederlando.
 299 Blokpoel, s-ro H. J., Rotterdam, Nederlando.
 300 Mabesoone, s-ro P. M., Amsterdam, Nederlando.
 301 Praag, Mr. Drs. I. v., Bentveld, Nederlando.
 302 Prins, Prof. Mr. Dr. J., Leiden, Nederlando.
 303 Birch-Olsen, s-ino S., Greaker, Norvegujo.
 304 Bugge-Paulsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo.
 305 Engen, s-ro Per, Drammen, Norvegujo.
 306 Fygle, s-ro Bjørn, Bodø, Norvegujo.
 307 Kjonigsen, s-ro Ragnar, Sarpsborg, Norvegujo.
 308 Maarli, s-ro E., Bodø, Norvegujo.

- 309 Resberg, s-ro Thure, Sarpsborg, Norvegujo.
 310 Ringstad, s-ro G., Torp, Norvegujo.
 311 Rosbach, s-ro Johan H., Sarpsborg, Norvegujo.
 312 Allan, s-ro J., Wellington, Nov-Zelando.
 313 Dearnley, s-ro E. R., Wellington, Nov-Zelando.
 314 Perfect, s-ro S. R., Wellington, Nov-Zelando.
 315 Robbins, s-ro Ross G., Auckland, Nov-Zelando.
 316 Coleman, s-ro M. H., Togoland, Ora Bordo.
 317 Gouveia, s-ro M. M. Lourenco de, Funchal, Madejro.
 318 Baade, s-ro Martin C., Elk Grove, Usono.
 319 Ballard, d-ro Francis E., Reseda, Usono.
 320 Blackstone, s-ro R., Orlovista, Usono.
 321 Brecht, s-ro F. W., Petrolia, Usono.
 322 Brink, s-ro Dirk, San Diego, Usono.
 323 Doneis, s-ro Armin F., Pharr, Usono.
 324 Dormont, s-ro L., Brooklyn, Usono.
 325 Eisele, s-ro J., St. Louis 18, Usono.
 326 Kalus, s-ro Louis, St. Louis, Usono.
 327 Lippmann, s-ino Elise C., Brooklyn 23, Usono.
 328 Myers, s-ro Weldon, Lakeland, Usono.
 329 Truner, s-ro G.P., Middleton, Usono.
 330 Vidack, s-ro J. Seattle 7, Usono.
 331 Grutter, s-ino L., Samedan, Svislando.
 332 Jayet, f-ino E., Pavis, Morges, Svislando.
 333 Sennhäuser, Schwester, Bern, Svislando.
 334 Cruz, d-ro A. B. M. da, Benguela, Angolo.
 335 Banham, s-ro F. R., Victoria, Aŭstralio.
 336 Kosutek, s-ro J., Albury, Aŭstralio.
 337 Boffejon, s-ro Hector, Brasschaet, Antwerpen, Belgujo.
 338 Boes, s-ro G. de, Gent, Belgujo.
 339 Vandeveld, s-ino M., Merlbeke-Gent, Belgujo.
 340 Abreu, s-ro Waldomiro B. de, Pindamonhangaba, Brazilo.
 341 Almada, s-ro Francisco, Sao Paulo, Brazilo.
 342 Araújo, s-ino Lygia de Oliveira, Santos, Brazilo.
 343 Bravo, k-lo Candido, Sao Paulo, Brazilo.
 344 Camara, s-ro M. de Arruda, Rio de Janeiro, Brazilo.
 345 Cesco, s-ro Elyseu, Campo Grande, Brazilo.
 346 Fóscolo, d-ro Hugo, Pompeu, Brazilo.
 347 Nunes, s-ro E. Pereira, Sao Paulo, Brazilo.
 348 Nunes, d-ro M. Ritter, Niterói, Brazilo.
 349 Oliveira, s-ro Lauro Jorge de, Santos, Brazilo.
 350 Peixoto, s-ro O., Niterói, Brazilo.
 351 Queiroz, s-ro Manoel Mendes de, Santos, Brazilo.

Bindaĵo por via Jarkolekto 1956

el bela verda tolo

Prezo 2.50 gld. 10 steloj

MENDU TUJ ĈE U.E.A.

Binditaj jarkolektoj

1952 3 — gld.

1953-1954-1955 po 6.— gld.

1956 8.— gld.

50 % da rabato por individuaj membroj de la koncerna jaro

MENDU TUJ ĈE U.E.A.

- 354 Severo, s-ro João Correa, Baje, Brazilo.
 354 Storace, s-ino Maria Luisa de Oliveira, Santos, Brazilo.
 355 Tálamo, s-ro José Alcides, Sao Paulo, Brazilo.
 356 Trebbi, s-ino Yolanda, Porto a Legre, Brazilo.
 357 Wehrs, f-ino E., Niterói, Brazilo.
 358 Aitchison, s-ro George R., Northampton, Britujo.
 359 Atkinson, s-ro G. B., London, Britujo.
 360 Atkinson, s-ro W. G., Worcester Park, Britujo.
 361 Cunningham, s-ro William, Fife, Britujo.
 362 Garraway, f-ino E., Sheffield, Britujo.
 363 Guise, s-ro W. C., Rugby, Britujo.
 364 Hanson, s-ro C. G., Devon, Britujo.
 365 Ison, f-ino H. M., Ardleigh, Britujo.
 366 Laurie, s-ro E. Jackson, Bournemouth W., Britujo.
 367 Laurie, s-ino W., Bournemouth, Britujo.
 368 Millidge, pastro R. G., Sutton, Britujo.
 369 Morton, f-ino H. R., London, Britujo.
 370 Pilling, f-ino F., Brunley, Britujo.
 371 Pilling, s-ro Harold, Burnley, Britujo.
 372 Ranwell, s-ro B., Enfield, Britujo.
 373 Relf, s-ro E. F., Addlestone, Britujo.
 374 Roome, s-ro G. W., Sheffield, Britujo.
 375 Saft, s-ro S., Salford, Britujo.
 376 Sarfas, s-ro E. W., New Barnet.
 377 Seddon, s-ino R., Southport, Britujo.
 378 Schofield, s-ro Bert S., Bolton, Britujo.
 379 Shaw, s-ro Francis W., Whitworth, Britujo.
 380 Smith, s-ro Norman R., Davyhulme, Britujo.
 381 Tweedie, s-ino Olga, Bournemouth, Britujo.
 382 Hansen, s-ro E., København, Danlando.
 383 Knudsen, s-ro Erling, Fåborg, Danlando.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
 kun kunlaborado de
 la plej famaj verkistoj
 aperas ĉiun duan monaton
 32/40 paĝa - - poŝformato
 jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
 konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
 landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
 7, Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
 Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
 Francujo.

- 384 Lange, s-ro Otto C., København, Danlando.
 385 Vasiljef, s-ro L., København, Danlando.
 386 Beau, s-ro Jean, Marseille, Francujo.
 387 Daveau, s-ro Th., Seine-Port, Francujo.
 388 Delaye, s-ro, Sr. Hilaire Petitville par Carentan, Francujo.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

B. van Hill, Usono, 3,80 gld; I. Johansson, Svedujo, 9.35 gld; N.N., Germanujo, 54.29 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

Sanghano Nyanasatta Thero, Cejlono, 3.— gld.
 Al ĉiuj donacintoj koran dankon.
 M. H. VERMAAS
 Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Londona Gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj mantenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, LONDON W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Britujo, Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Bulgarujo, Finnlando. Skribu, indikante **viajn** sekson, aĝon, profesion, al: Daniel LUEZ, LAON (Aisne), Francujo kaj enmetu unu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Spiritisma Grupo „E.E.E.” deziras kontaktiĝi kun spiritistoj el la tuta mondo. La samidealanoj sin turnu al adreso: Caixa Postal 507, Belo Horizonte (M.G.), Brazilo.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp.kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Baldaŭ, Libervola Internacia Civila Servo starigos multenombrajn laborkampojn. Miloĵ da ĝejnuloj partoprenos. Esperantista ĉeesto utilos por propagandi esperanton. S.C.V.I., 77 Jean Jaurès, Clichy (Seine) Francujo.

Wüster: „Internationale Sprachnormung in der Technik”, Berlin 1931, aĉetas/interŝanĝas Dipl. Inĝ. Alfred Warner, Textorstr. 81, Frankfurt (Main) Germanujo.

Por studoj kaj radioparoladoj mi urĝe bezonas: Guérards' „Histoire de la langue internationale”; detalojn pri „logopandekteision”; tekston de „Patro nia” en Volapük, Ido, Latino sine flexione, Novial ktp. Mi pagos pere de U.E.A. Kiu havigos al mi mian verkon „Bakŝiŝ”? Miaj libroj perdiĝis dum vojaĝado. Mi petas alsendon al U.E.A. aŭ al: L. H. M. Newell, 397 Military Road, Largs Bay, S.A. Aŭstralio.

La 44-a Japana Esperanto-Kongreso okazos en 17, 18 kaj 19 aŭgusto en centra japana urbo Nagoya. La Kongresa Kaso havas specialan provizon por senpaga restado dum unu semajno en la kongresa periodo por pluraj fremdlandaj gastoj. Aliĝontoj kontaktu al NAGOJA ESPERANTO-SOCIETO, Syowa-ku Tohata-tyo 1-51, Nagoya.

Seplingve parolanta fraŭlo en Laplando deziras korespondi kun fraŭlinoj el la sudaj landoj. Mi konas la tutan eŭropan kontinenton kaj volonte akceptos koresp. kun aliaj kontinentoj. Frederiko Neumeister. „Hotel-Laponia” Arvidsyjaur. Laplando, Svedujo.

Deziras interŝanĝi p.m. kun bildoj de floroj kaj bestoj tutmondaj. La provinc-serioj 1951-'53 de Venezuela. Bazo Ivert '57. P. Pijpers, Jodenstraat 34, Venlo, Nederlando.

Klubo Esperantista, Skövde, Svedujo, aranĝos meze de septembro jubilean ekspozicion en urba muzeo por celebri sian 25-jaran agadon. La klubo danke akceptos el la tuta mondo esperantaĵojn por la ekspozicio. Ankaŭ gratulaj salutoj pro jubileo certe multe efikos al ne-esperantista publiko. Gastojn ni kore salutas kaj bone prizorgos. La jubilea festeno estos la 28 septembro.

Kapustin Leonid Grigorjeviĉ gvidas ko-

respondservon, atendas proponon por la celo el ĉiuj landoj; ankaŭ kolektas naci-lingvajn Esperanto-ŝlosilojn, sendante samajn je rusa lingvo laŭ dezirata kvanto — minimume du — por energie disvastigi Esperanton inter nesciantoj en la tuta mondo. Helpu kaj aranĝu multan korespondadon laŭ adreso: p/k 110 „Esperanto”, Gorjkij 7, USSR.

Studento 22 jaraĝa deziras korespondi kaj interŝanĝi bild pk. aŭ poŝtmarkojn. Ljubomir Haĝidimitrov, Car Asen 27a, Varna, Bulgarujo.

50 ĝelernantoj (12—14 jaraj) deziras interŝanĝi bildkartojn kun la tuta mondo. Adreso de ilia gvidanto: Prof. Pál Liszy, Fürst Sandor-u 14, Székesfehérvár, Hungarujo.

Esperanto-ekspozicio estos aranĝata en la regiono de Magdeburg-Orienta Germanio. Bonvolu sendi ekspoziciaĵojn, propagandaĵojn al jena adreso: Fr. Tischer, Magdeburg-Buckau, Martinstr. 9, Germanujo-DDR. Koran antaŭdankon. La ekspozicio okazu komence de majo.

Lernolibrojn diversajn interŝanĝas kun ĉiuj landoj, en ĉiuj lingvoj la plej granda bulgara ŝtata eldonejo, kiu eldonas lernolibrojn por elementaj, mezaj kaj duon-superaĵ lernejoj en bulgara kaj en turka lingvo. Dum la 42-a Universala kongreso en Marseille, redaktoro Sim. Hesapĉiev, delegito de UEA, volas persone kontaktiĝi kun kolegoj ĉiulandaj. Skribu kaj proponu al: Ŝtata eldonejo „Narodna prosveta” str. V. Drumev, 37, Sofia, 5, Bulgarujo.

Juna oficisto 19 jara deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun gesamideanoj el la tuta mondo. Precipe deziras interŝanĝi poŝtkartojn. Petar Djeorgievski, Ul Lenin 54, KUMANOVO, Makedonija, Jugoslavio.

Inteligentaj gelaboristoj kaj studentoj de superaĵ institutoj deziras korespondi kun esperantistoj de la tuta mondo pri diversaj temoj. Respondo garantiita. S. N. Kletenik, str. Engels 111, 1, Rostov na Donu, USSR.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn precipe memorigajn kun seriozaj kolektantoj, kvanto kontraŭ kvanto. Sendu unue. Respondo certa. Anonco validos ĉiam. Salvatore Contino, Via Aspromonte 32, Catania, Italujo

HOTELO „DE SPARREN”

Naarderstraat 70
 Tel. 0 2953 - 3422
 LAREN (NH)
 Nederlando

Belega ĝardeno 11.000 m²
 Varma kaj malvarma akvo en ĉiuj ĉambroj

Esperanto parolata

VAGADO SUB PALMOJ

Jean Ribillard



Streĉe
 interesaj vojaĝimpresoj

Prezo 2.50 gld. 10 steloj

MENDU ĈE U.E.A.

GRAVA VERKO MEMORLIBRO DE LA TRIA ESPERANTISTA EŬKARISTIA MONDKUNVENO

Okazinta en la Kadro de la
XXXVI^a INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO
 Kompilita de Pastro D-ro Johano Baptisto Kao O.F.M.

Formato 19x14 cm kun 215 paĝoj de teksto plus 75 ilustraĵoj; presita sur bonkvalita papero. Bonega libro por ĉiuj bibliotekoj de esperantistaj asocioj kaj tre efika instrumento por la propagando de nia lingvo precipe en la katolikaj medioj. Prezo: 2 usonaj dolaroj aŭ 8 ned. guldenoj aŭ 150 braz. kruzejoj plus afranko. Akirebla ĉe

LIBRO-SERVO de Espero Katolika
 Frederikstraat 10, DORDRECHT,
 Nederlando

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
 Praça da Republica no. 54 sob.
 RIO DE JANEIRO, Brazilo

kaj ĉe U.E.A.

MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO



Henrik Ibsen:
PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld
afranko 0,40 gld.

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Eendrachtsweg 7 - Rotterdam-C. - Nederlando

Kroatia Esperanto Ligo eldonis libreton:

TEATRO EN SOCIETO

Aŭtoroj: E. Lapenna, M. Mamuziĉ, S. Mulo.
Mallongaj originalaj teatraĵoj ludeblaj en societejoj,
distre-karakteraj.

Scenejo, kulisoj, teatraj kostumoj nebezonaĵ.
Konvena helpilo en laboro kun gejunuloj.
Programeroj por Zamenhofaj-vesperoj.
Legajo por konversaciaj kursoj.

Prezo: en Jugoslavio 120 Din, en eksterlando 2 ned.
guldenoj.

MENDU ĈE UEA

GIUJ STUDANTOJ ...

devus scii pri la ekzisto de regula monata gazeto por
universitataj kaj liceaj studentoj en la tuta mondo.

Verkata de studentoj por studentoj, „Mondaj Studen-
taj Novaĵoj” proponas informojn, arton kaj kulturon,
sporton kaj sciencon, humuron, kaj forumon al tiuj,
kiuj studas.

Ĝi estas eldonata de la Internacia Unuiĝo de
Studentoj en ses lingvoj, kaj ĉie disvendata. Abono
estas malmultekosta, kaj senpagajn specimenajn ekzem-
plerojn kaj adresojn de lokaj perantoj oni povas ricevi
de: World Student News, Vocolova 3, Praha, Ĉeĥo-
slovakio.

MONDAJ

STUDENTAJ

NOVAĴOJ

Oficiala antaŭkongreso en Parizo

29 julio - 2 aŭgusto 1957

Ekskursoj al Versailles, vizito tra
Parizo, Parizo nokte, ŝipekskurso
sur Seine

Kotizo 600 Fr.

Paĝoj ĉe la Universala Kongreso en Marseille,
32, Cours Estienne d'Orves,
Marseille

2-A INTERNACIA INFANKONGRESETO

dum la 42a Universala Kongreso
de Esperanto

Ludoj, kantoj, dancoj, amuziĝoj,
filmoj, promenadoj, ekskursoj,

internacia kunrestado por geetu-
loj parolantaj Esperanton

Kotizo: 3,000 Fr. inkluzive manĝojn

Skribu al **s-ro F. Cadenel,**
32 rue George, Marseille 5,
Francujo